Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 24 — trimonata **1-2/94**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: KOVÁCS Márta

Vic-redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

SMIDÉLIUSZ, Katalin: Enkondukaj pensoj al la Cseh-jubileoj 1
NAGY, Edit: Kialoj por lerni Esperanton 7
DÖRR, Josef: Baza vortprovizo de Esperanto cele al instruado 21
Metiejoj: ROSBACH, Johan H.: La lingvo kiel ilo 26
JANSEN, Sjak: Vizitu la Talento-lernejon! 29
Recenzoj 30
Raportoj: Internacia Kongreso de Instruistoj pri Fremdlingvoj 38
Lernejaj konkursoj 39
TV-kurso en Esperanto 42
Projekto Fundapax 43
De niaj legantoj 46
Instrua praktiko 49
Financa raporto 1993 50

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. *(Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado).*

Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*

Sekretario: Marija Beloŝeviĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb-Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj nefaka programo.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*

Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2 HU-2030 Érd, Hungario. *Eldonado*

Enkondukaj pensoj al la Cseh-jubileoj

Katalin SMIDÉLIUSZ

La 100jara kaj la 15jara datrevenoj devigas nin halti kaj kun estimo memori fervoran pedagogon de la internacia lingvo. En 1995 estos la centjara datreveno de la naskiĝjaro de Andreo Cseh, ĉiprintempe estis jam la 15a de lia forpaso. Al la jubileoj aldoniĝos ankoraŭ la 65jara datreveno de la fondo de la Internacia Esperanto-Instituto, festota sekvontjare.



Andreas CSEH (Andreo Ĉe, laŭ la propra skribmaniero kaj prononco) naskiĝis la 12an de septembro 1895 en Marosludas [maroŝludaŝ], Transsilvanio.

Li estis hungaro kun iom da ĉeĥa sango, al kio aludas lia familia nomo, kies signifo en la hungara lingvo estas "ĉeĥo".

Li konatiĝis kun Esperanto en 1910 pere de gazetanonco. Post la alproprigo de la internacia lingvo li fervore propagandis, poste ankaŭ instruis ĝin. En 1919 li pastriĝis kaj sekvontjare en sia unua laborurbo Sibiu, li aranĝis kurson por diversnacia laboristaro. La cirkonstancoj tute nature kondukis lin al la tiel nomata rekta, "patrina" metodo, kiun li pli kaj plibonigis dum sia posta agado. Esperanto kaj ĝia disvastigo gravis por li tiomgrade, ke en 1924 li petis permeson de sia episkopo kaj fariĝis libera apostolo de la internacia lingvo. Li gvidis kursojn post kursoj multloke en Eŭropo, pere de lia instruado entuziasmiĝis miloj da esperantistoj en Hungario, Estonio, Latvio, Pollando, Germanio, Francio, Svislando, Norvegio, Nederlando. Al Svedio en 1927 li estis invitita de la reĝa princo Karlo kaj de la Stokholma urbestro. Dum lia tiama vizito okazis kurso ankaŭ en la sveda parlamento.

Andreo Cseh instruis en grandnombraj kursoj, famiĝis lia metodo kaj kreskis intereso pri ĝi. En 1929, dum la unua internacia pedagogia seminario en Budapeŝto, estis organizita la unua porinstruista kurso. Andreo Cseh opiniis grava tiun laboron kaj kun aparta entuziasmo edukis siajn adeptojn.

Idealan lokon por tiuj kursoj kaj aliaj esperanto-aranĝoj li trovis en Nederlando, en la urbo Arnhem. Tie estis fondita en 1930 de sinjoro Cseh kaj gesinjoroj ISBRÜCKER la Internacia Cseh-Instituto, kiu poste translokiĝis al propra domo en Hago. Bedaŭrinde la domo en Arnhem ne plu ekzistas.



La Esperanto-Domo en Arnhem.
La bildo estas unu el la demonstriloj, uzitaj dum la Cseh-kursoj

Krom la organizado de movadaj aranĝoj kaj programoj, Andreo Cseh en 1932 komencis redakti kaj eldoni internacian revuon "La praktiko" por ebligi la lingvouzon de la internacia lingvo. La revuo aperis ĝis la 70a jaro. Por la nuna leganto ĝi povas esti bona spegulo pri la riĉa esperanto-vivo de la "malnovaj tempoj". Amaso da fotoj, programoj kaj raportoj prezentis la aranĝojn; gramatikaj testoj, konkursoj, literaturaĵoj zorgis tiam pri la "lingvo-flegado"; ŝercoj, ilustraĵoj amuze vigligis la revuon. Valoras ekkoni la ankoraŭ ekzistantajn numerojn de la serio.

Alia merito de Andreo Cseh estis la fondo de la Universala Ligo (UL) en 1942, kiu havis propran monunuon STELO, oficiale akceptita de bankoj. Ekzistis moneroj de unu-, kvin-, dek- kaj, post 1965, dudekkvin-stela valoroj. (Kompletoj aĉeteblas ankoraŭ.)

La lastajn jarojn de sia vivo Cseh pasigis en pensiono por maljunuloj kaj mortis antaŭ 15 jaroj, la 9an de marto 1979. Li ripozas inter la pastroj kaj episkopoj en la kripto de la romkatolika tombejo Kerkhoflaan, je dekminuta promenado de la domo de IEI.

La nomo de sinjoro Cseh estas konata al ĉiu esperantisto. La metodo, portanta lian nomon, estas karakterizaĵo de nia movado, kies ĉefajn elementojn decas koni al ĉiu instruisto de nia lingvo.

Bazaj principoj, karakterizaj trajtoj de la Cseh-metodo

La metodo ne estis esence nova en la 20aj jaroj. Fine de la 19a jarcento funkciis jam pli ol 70 lernejoj de Maximillian BERLITZ, kie oni uzis rektan metodon por la lingvoinstruado. La metodo de nia Cseh multe similis al tiu de la Berlitz-lernejoj. Andreo Cseh adaptis ĝin al la "verdaj" cirkonstancoj. La okulfrapa diferenco estis la kvanto de la instruataj lernantoj. Dum en la Berlitz-lernejoj la lingvoinstruado okazis en tre malgrandaj grupoj (ofte individue), neniam al pli ol 10 personoj, Andreo Cseh ne malofte gvidis kurson al pli ol 100 homoj samtempe. Escepte tion, la forigo de la gepatra lingvo, la konsekvenca kaj ĉiama uzo de la cel-lingvo; la komprenigo de la novaj vortoj pere de prezentado aŭ ĉirkaŭskribo; la indukta alproprigo de la gramatikaj reguloj; la prioritato de la parolo kaj komunikado estas la bazaj principoj por ambaŭ metodoj.

La plusoj de la Cseh-metodo devenas de la cirkonstancoj kaj de la personeco de Andreo Cseh. En la Cseh-metodo la lernantoj ne uzas lernolibron, kvankam ekzistas zorge ellaborita, strikte sekvenda gramatika materialo, kiu donas la bazon de la kursmaterialo. Ĝi troveblas en la BAZA CSEH-KURSO, libro kun metodikaj konsiloj, gvidilo kaj modelo por la instruantoj. La celo de la Cseh-metodo estas instrui komuniki, kaj ne legi aŭ skribi. La komuna (korusa) ripetigo ne nur psike kuraĝigas, sed en enorme granda grupo estis la nura irebla vojo por prononcigi la novan materialon.

La kreo de bezonoj, prezentado, uzo de objektoj kaj bildoj, kontrastigo, rakontoj, gestoj, pantomimo, teatraĵo, la specialaj inventaĵoj de Andreo Cseh, kiel: "trifoja negativo", "esperanta matematiko", "operacio" estis la iloj de lia "armilaro". La iama bonhumoro, la modela esperantisteco, la empatio kaj la bona lingvouzo spicis liajn kursojn.

Andreo Cseh ne inventis ion tute novan, sed estas eĉ ĝis nun unika tiu laboro, kiun li faris uzante la metodon, edukante siajn disĉiplojn, kompilante materialon kaj kreante instruhelpilojn por plifaciligi la lingvoinstruadon. Tion ni taksas alte kaj opinias nepre sekvenda (sed almenaŭ koninda).

IEI kaj ĝia celo

La Internacia Cseh-Instituto fondiĝis la 24an de majo 1930 en la nederlanda urbo Arnhem. Ĝi estas kultura fondaĵo, aprobita de la nederlanda registaro. Ekde 1933 ĝia sidejo estas en Hago, (Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag), ekde 1954 ĝia nomo estas Internacia Esperanto-Instituto (IEI). Evidente la tempopaso ŝanĝis multon, sed ne la originalan celon: diskonigi la Cseh-metodan instruadon. IEI organizas Cseh-metodajn seminariojn por la instruantoj de la metodo kaj disponigas al ili helpmaterialon, kiel: Cseh-kurslibron, kompleton de instruhelpiloj, novajn eldonaĵojn de la instituto, funkciigas ankaŭlibroservon.

Por instrucele registri kompletan kurson, instruitan laŭ la "pura" Cseh-metodo, estis surbendigita (kaj ĉe IEI aĉeteblas) 18hora lingvokurso (12 ren-kontiĝoj) gvidita de s-ino Audrey CHILDS-MEE, elstara aplikanto de la metodo. Danke al ŝi, post la morto de la majstro ne ĉesis, eĉ iom refreŝiĝis la laboro. Bedaŭrinde antaŭ kelkaj jaroj ankaŭ ŝi forpasis, lasante al ni la devon fini la komencitajn reformojn, savi la valorojn kaj pluporti la flamon.

La konscio pri la valoroj de la metodo, la deziro fari ion por la edukado de instruistoj kaj disvastigo de la metodo, por ne lasi perdiĝi la jam atingitajn, instigis nin, kelkajn "junulojn" savi la ankoraŭ saveblan, eĉ eble reformi la metodon, adapti ĝin al la modernaj cirkonstancoj. Kvankam fervoraj, bedaŭrinde ni estas ankoraŭ malmultaj.

Apartan varbadon nek por la kursoj nek por seminarioj ne atendu de la instituto. Landaj asocioj, lokaj societoj serĉu la eblojn, arigu la interesiĝantojn kaj poste petu fakan helpon de la aktivuloj de la instituto.

Kiuj kaj kial studu la Cseh-metodon?

Oni ofte aŭdas kritikon pri la metodo, multaj opinias ĝin eksmoda, kvankam ĝi estas simple malnova.

Ĉiam doniĝas situacioj kiam la trajtoj de iu metodo estas pli taŭgaj ol tiuj de la alia, ja la elekton de iu certa metodo influas interalie la celo kaj la cirkonstancoj de la instruado. Tio validas ankaŭ por nia lingvo.

Veras ankaŭ tio, ke oni malofte uzas nur unu solan metodon, plej ofte ni aplikas la plej taŭgajn elementojn de unu aŭ de alia metodo. Koni plurajn metodojn signifas havi pli riĉan armilaron, esti multkoloraj eĉ se temas pri "verduloj".

La bona Cseh-instruisto instruas laŭ la metodo dum siaj Cseh-kursoj kaj tute nature aplikas la elementojn de la Cseh-metodo dum siaj aliaj kursoj, kombinante tiujn kun aliaj "trukoj" kaj teknikeroj.

Gvidinte jam plurajn seminariojn por eduki Cseh-instruistojn, mi povas konstati ke la enkondukajn seminariojn partoprenas esperantistoj ne nepre kun celo fariĝi Cseh-metodaj instruistoj. Ili venas por ekkoni la faman metodon, ekhavi informon pri tiu valoraĵo de nia kulturo. Ja tiu ĉi metodo formas neapartigeblan parton de la esperanta kulturo. Dankon por tiutipa intereso.

Nur parteto de la seminarianoj daŭrigas la sekvan ŝtupon, ja ili mem spertas, ke la instruado estas arto, malfacila "metio", kaj instrui fremdan lingvon, precipe en la fremda lingvo mem, estas eksterordinara afero.

Mi, estante lingvoinstruisto, neniam intencis ekzemple operacii malsanulon, eble nur provizore mildigi doloron. La volo, ke ies doloro foriĝu, ankoraŭ ne anstataŭigas la fakajn konojn por vere scii kiel agi por la resaniĝo. Kial pensas homoj, ke ĉiu kapablas instrui? Kial oni subtaksas tiun ĉi profesion? Koni bone iun lingvon ankoraŭ ne signifas kapablon transdoni la konojn. Fari ĝin majstre, jen nia arto, kion oni povas fari bone nur kun "pedagogia-vejno", (ne

nepre nur kun diplomo). Necesas mencii, ke eĉ bona pedagogo ne provu instrui la lingvon sen regi ĝin altnivele!

Studi, koni la metodon ni konsilas al ĉiuj: al pedagogoj kaj ankaŭ al neinstruemaj. Por fariĝi tiu-metoda instruisto, oni unue vidu la subajn liniojn.

Kiel fariĝi Cseh-instruisto?

Iam ekzistis 600 diplomitaj Cseh-instruistoj, laborantaj en 28 landoj de la mondo. Nun estas multe malpli, kaj ankaŭ ilin atingis la senlaboreco. Tamen la estraro de IEI planas restarigi similan reton de Cseh-instruistoj, reakiri la iamajn famon kaj sukcesojn, sed precipe la lernemon de homoj. Netuŝante la esencajn bazajn principojn de la metodo, tamen refreŝigante la formojn kaj helpilojn, oni ellaboris trigradan edukformon, kiu konsistas el 3 seminarioj.

Seminario-A estas enkonduka, kies ĉefa celo estas ekkonigi la esencon de la metodo, vidigi ĝin en la praktiko. La seminarianoj observas kurson, gvidatan laŭ la Cseh-metodo, diskutas la metodon kaj en 5-minuta provleciono pruvas, ke ili bone komprenas ĝiajn plej gravajn ecojn, kapablas uzi la teknikerojn. La seminarian laboron antaŭas lingva testo kaj la modellecionoj rajtas prezenti nur lingve firmaj kandidatoj. La seminarioj estas 4-5 tagaj, ekzemple dumkongrese.

Seminario-B: estas pliprofundiga. La programon nuntempe oni preferas plenumi koresponde. Dum tiu ĉi ŝtupo la celo estas altigi la lingvan nivelon de la seminarianoj, konsciigi la gramatikon, detale konigi la kursmaterialon kaj la fakliteraturon. Ofte estas bezonataj pluraj monatoj por profunde analizi ion kaj pretiĝi al la skriba ekzameno pri gramatiko kaj la Cseh-metodo. Dum tiu etapo la kandidatoj jam praktikas la metodon, gvidante kurson laŭ la metodo.

Seminario-C: estas la praktika parto. La kandidatoj estas komplekse ekzamenataj pri movadhistorio, Esperanto-literaturo, kaj pri la Cseh-metodo. La buŝan ekzamenon kompletigas la ekzamena instruado, gvidado de 20-minuta leciono laŭ lotumita temo.

Post la sukcesa trapaso de la tri ŝtupoj oni ricevas diplomon pri kapablo kaj rajto instrui laŭ la Cseh-metodo. (Nur la C-grada diplomo rajtigas al la gvidado de Cseh-kursoj.) Profesiaj fremdlingvo-instruistoj rajtas sekvi studojn por edukiĝi seminari-gvidantoj de tiu ĉi metodo.

Ĉe IEI akireblas listo de diplomitaj Cseh-metodaj instruistoj. (Se vi intencas organizi Cseh-kurson aŭ seminarion, petu la nomaron de la instituto.)

ALVOKO JE KONKURSO

La Hungaria Sekcio de ILEI decidis dediĉi sian dutagan tradician jarkunvenon de 1995 al la memoro de la granda hungara esperanto-instruisto. Kadre de tiuj memortagoj okazos prelegoj pri A. Cseh, pri lia metodo; estos prezentitaj fragmentoj de lecionoj, demonstrantaj la karakterizajn trajtojn de la

metodo; okazos ekspozicio de Cseh-aĵoj kaj instruhelpiloj de la metodo. Antaŭvideblas diskutoj pri la nuna rango kaj pozicio de la metodo kaj de la esperanto-instruado. Kompreneble ni scias, ke ne ĉiu interesiĝanto povas ĉeesti la programon, sed kial ne kontribui ĝin?

La organizantoj, subtenate de IEI, ĉiloke anoncas konkurson por surpaperigi viajn memorojn pri Andreo Cseh, pri liaj lecionoj, kursoj kaj seminarioj, pri eventoj ĝis nun ne konataj al la publiko. Ne lasu forgesiĝi la memorojn, bonvolu rakonti al ni, kio estis lia sekreto, per kio li sukcesis allogi la amasojn, kiujn historietojn vi memoras pri li.

La alia temo de via konkursaĵo povas esti la metodo mem. Ni atendas viajn spertojn kaj opinion pri ĝi kaj memorojn pri aliaj Cseh-instruistoj, kiuj sukcese uzis la metodon.

Bonvenas ankaŭ kontribuaĵoj al la ekspozicio.

La premio estas la komuna riĉiĝo, la estimplena memorado.

IEI ofertas librojn al la plej sukcesaj konkursantoj kaj ĉiu ricevas ekzempleron de la memorkajero, kompilota el la konkursmaterialo kaj el la programo de la aranĝo.

La maksimume kvinpaĝajn kompilaĵojn sendu al la verkinto de tiu ĉi artikolo. Limdato: 31 de oktobro, 1994.

Katalin SMIDÉLIUSZ
H-9700 Szombathely,
Apáczai sétány 10. Hungario



Partoprenantoj de la Internacia Pedagogia Kurso gvidita de A. Cseh Budapeŝto, 22. jul. – 2. aŭg. 1929.

Samurbe, sed ĉu samkvante ni estos fine de februaro en 1995?

Kialoj por lerni Esperanton en nuntempa Hungario

Lingvosociologia enketo inter hungaraj esperantistoj

NAGY Edit (Hungario)

Mallongigita versio de diplomverko ĉe Universitato Eötvös Loránd

1. Enkonduko

Kiam ie mi diras, ke mi lernas Esperanton, homoj tuj reagas: "Kial vi lernas Esperanton? Kial ĝi estas bona (en la senco 'utila') al vi?" Mi estas certa, ke ĉiuj esperantistoj devas alfronti ĉi tiujn demandojn, kutime plurfoje dum la vivo. Respondoj varias depende de la personeco de la esperantisto: kiel li/ŝi lernis/lernas la internacian lingvon, ĉu li/ŝi partoprenas en Esperanto movado, ĉu li/ŝi interesiĝas pri fremdaj lingvoj aŭ ne. En ĉi tiu laboraĵo mi donas la respondojn pri kaŭzoj kaj celoj, kiujn mi ricevis de hungaraj esperantistoj.

Mi volis ekkoni la averaĝan esperantiston, pro tio mi devis demandi multajn. Mi kapablis fari tion per enketo, kiun mi prilaboris per komputilo. Multan dankon por la helpo de mia instruistino D-rino Ilona KOUTNY kaj mia amiko Tibor KUPÁS. RÉVÉSZ (1984) kaj LEYK (1979) ankaŭ okupiĝis pri sociologiaj kaj sociolingvistikaj karakterizoj de Esperanto. Similaj socilingvistikaj enketoj estas malmultaj. Mi ŝatus mencii ĉi tie tiun de FORSTER en Britio en 1982 kaj tiun de ĈEA (Ĉeha Esperanto-Asocio) en 1981. En Hungario PRINCZ (1989) prenis la taskon, sed nur parto de la rezultoj estas jam publikigita.

La celo de mia enketo estis informiĝi pri la motivoj, celoj kaj opinioj de hungaraj esperantistoj koncerne la lingvon kaj la movadon, ekscii kiel ili vidas la staton de Esperanto en la mondo kaj kiel rilatas Esperanto al ilia scio de aliaj fremdaj lingvoj. Veran komparon mi ne povas, eĉ ne volas fari, ĉar niaj rimedoj kaj vidpunktoj malsamas.

2. Esperantistoj en Hungario

En nuntempa Hungario preskaŭ ĉiuj profesiuloj havas iun ajn ideon pri la internacia lingvo, Esperanto. Iliaj opinioj varias depende de iliaj konoj pri Esperanto. Ĉi tiujn informojn ili povas akiri — laŭ mi — el sufiĉe malmultaj fontoj. Unu el la fontoj, sed la plej grava estas tio, kion esperantistoj mem diras pri siaj spertoj, sentoj kaj opinioj koncerne Esperanton.

Por ekscii, kiun perspektivon Esperanto havas, logike prezentiĝas la problemo, kion oni povas fari per Esperanto, kiel oni povas uzi la lingvon. En la dudeka jarcento 'benefico' estas la ŝlosilo por kompreni la sociajn procezojn. En Hungario Esperanto estas egale konsiderata inter aliaj etnaj fremdaj lingvoj. Oni povas lerni ĝin en ŝtataj lernejoj, oni povas instrui ĝin, oni povas fari ŝtatan ekzamenon pri ĝi, eblas eldoni Esperantlingvajn revuojn. Estas in-

terese, ke Hungario estas la sola lando, kie oni povas akiri universitatan diplomon pri Esperanto. Memkompreneble ekzistas homoj, kiuj faras ion *l'art pour l'art*. Al multaj esperantistoj lernado kaj uzado de la lingvo estas kvazaŭ hobio. Parte tio devenas de la fakto, ke oni ne scipovas uzi Esperanton en multaj terenoj de vivo. Sed unu 'terenon', unu aspekton iomgrade Esperanto enhavas laŭ mia opinio. Tio devenas de ĝia ekesto. Mi pensas pri la Zamenhofaj ideoj de homaranismo, mondpaco ktp. Koncerne la motivojn por lerni Esperanton mia hipotezo estas, ke interkompreniĝo kun homoj el la plej diversaj landoj kune kun eluzado de ĉi tio dum vojaĝado eksterlande okupas la unuan lokon inter motivoj kaj ankaŭ ĉi lasta estas la plej ofta formo de uzado.

Por pruvi mian hipotezon, por ekscii pli multe pri la nuntempa hungara esperantistaro kaj povi respondi la demandojn menciitajn mi preparis enketilon.

3. La enketo

La enketilo konsistas el 27 simplaj kaj kompleksaj demandoj, kiujn mi klasifikas en 4 grupojn: demandoj pri

- personaj datumoj,
- lernado de Esperanto,
- opinio kaj uzado de Esperanto,
- scio de aliaj fremdaj lingvoj.

La enketilon mi preparis hungarlingve. Mi pensis, ke tiel ankaŭ komencantoj kuraĝos plenigi ĝin. Mi ankaŭ konsideris alian subjektivan faktoron: laŭ mi uzante la gepatran lingvon homoj pli frue prenas skribilon kaj komencas plenigi la enketilon. Memkompreneble, plenigi la enketilon ne estis deviga (nek povis esti).

Esploratajtavoloj

Al kiuj dissendi? Neniu havas adresliston de esperantistoj, ĉar ne ĉiuj esperantistoj aliĝis al iu Esperanto organizaĵo. Dank' al la estraro de HEA mi ricevis la adresojn de lokaj aŭ fakaj Esperanto-grupoj kaj mi dissendis enketilojn al ĉi tiuj grupoj. Mi ankaŭ sendis enketilojn al kelkaj homoj, kiuj faris ŝtatan ekzamenon pri Esperanto, al partoprenantoj de "fiŝtago" kaj al lernejanoj. 900 enketiloj estis dissenditaj. Persone mi donis kaj rericevis 130 el ili. Per poŝta servo mi dissendis 758 enketilojn kaj mi ricevis 245 respondojn. Ĉi tio estas ĉirkaŭe 32%, kio estas bona rezulto.

4. Rezultoj

Personaj datumoj (Procentoj estas rondigitaj.)

152 viroj kaj 221 virinoj resendis enketilojn. Du personoj forgesis indiki sian sekson. Estas interese, ke multe pli da virinoj resendis la enketilon ol viroj. Mi atendis proksimume egalan dividon. FORSTER trovis la dividon male: nur 33%-ojn de la membroj donas virinoj.

La aĝdivido estas jena laŭ Tabelo 1:

Tabelo 1

jaroj malpli ol 15 =	8
15-20 =	122
21-25 =	27
26-30 =	20
31-35 =	22
36-40 =	29
41-50 =	52
51-60 =	39
pli ol 60 =	54

Du personoj ne indikis sian aĝon. La elstara nombro de demanditoj havantaj inter 15 kaj 20 jarojn ne estas surpriza. Mi persone disdonis ĉirkaŭe 85 enketilojn al mezlernejanoj. Sed oni povas observi la sekvan pripensigan: krom baz- kaj mezlernejanoj plimulto de la demanditoj aĝas super 40 jaroj. Ĉe FORSTER same: la plimulto de BEA-anoj aĝas inter 40 kaj 79. La plej multaj estas super la aĝo de 60 jaroj. Tiu ĉi datumo koincidas kun alia datumo, laŭ kiu 42 personoj de la demanditoj jam estas pensiuloj. (La fakton, ke Esperanto estas ĉefe nur hobio, mi pritraktos sur la sekvontaj paĝoj.) Ĉi tiun penson fortigas tiuj nombroj, kiuj estas la plej malgrandaj. Ĉi tiuj du nombroj apartenas al la aĝgrupoj inter 26 kaj 35 jaroj. Ĝenerale tiu aĝperiodo estas la plej aktiva kaj grava. Tiutempe averaĝa hungara junulo estas okupata per sia nova familio kaj konstruado de propra hejmo. Tio kostas multe da tempo.

Respondoj alvenis el preskaŭ ĉiuj partoj de la lando. Relative malmultaj esperantistoj sendis respondojn el la ĉefurbo. Nekonsiderinte tiujn enketilojn, kiujn mi ricevis persone, Budapeŝtanoj reprezentas nur 8%-ojn (20 % de hungaranoj vivas en la ĉefurbo.)

La kvara demando estis pri profesio. Mi ricevis 132 respondojn de lernejanoj, ĉefe de mezlernejanoj (persone). La dua plej grandnombra grupo de demanditoj estas pensiuloj (11%), kiel mi jam menciis kadre de la aĝdivido. En la brita enketo 53% de plenkreskuloj estas aktivaj kaj 35% estas pensiuloj. La plej interesa fakto estas, ke 36 (ĉ.10%) demanditoj estas instruistoj! En Britio ankaŭ instruistoj nombras sufiĉe multe.

Inter la celoj 21 personoj respondis, ke sia celo per Esperanto estas pludoni, disvastigi kaj instrui la internacian lingvon. 19 (ĉ.5%) respondoj venis de inĝenieroj, nur 3 de kuracistoj. 10 personoj ne respondis je la demando. Se mi ne konsideras pensiulojn kaj lernejanojn, evidentiĝas la fakto, ke ĉirkaŭe unu triono de la demanditoj estas intelektulo. Eksklude lernejanojn kaj tiun, kiu ne respondis ni ricevis la sekvan rezulton: t.e. pli ol duono de la demanditoj havas altgradan edukadon. FORSTER trovis similan fenomenon: multaj (kompare kun la tuta popolo) ricevis la plej altnivelan mezgradan edukadon kaj ankaŭ relative multaj ricevis altgradan edukadon. Laŭ mia opinio ĉi tiu fakto ne estas surpriza. Mi pensas, ke tiu persono, kiu studis pli multe, estas pli sentema je sociaj demandoj ol tiuj, kiuj ne pasigis tiom multe da tempo per studado. Ĉi tiuj intelektuloj havas pli larĝan horizonton kaj pli frue kaptas la veran valoron de internaciaj problemoj. Ĉar ili 'alkutimiĝis' al studado, ili pli frue emas lerni

ion, kio ne estas deviga. Esceptoj ekzistas. Ĉi tio estas mia opinio, sed ne eblas pruvi. La dua plej granda nombro estas de tiuj, kiuj akiris abiturientan diplomon. Tio fortigas la jam diritajn.

Respondoj de la sesa demando donas informon pri la familia stato de la demanditoj. Nekonsiderante tiujn, kiuj havas 20 jarojn aŭ malpli (130 personoj) mi ricevis la sekvan rezulton: 125 personoj (51%) havas propran familion (la unuaj du punktoj), la aliaj "plenkreskuloj" ne devas zorgi pri propra familio – tiel ili povas havi pli da libertempo. Ili donas preskaŭ la duonon de la grupo, kiu proporcio estas sufiĉe alta, sed komprenebla pro la ĵus menciitaj. Sed ni restu iom pli ĉe la familio. La plej multe da esperantistoj (265–70%) estas 'solaj' en la familio, tio signifas, ke nur li/ŝi parolas Esperanton en sia familio. Gefiloj de 26 esperantistoj lernas aŭ parolas Esperanton. Kvankam 142 havas gefilojn, el ili nur 23 aĝas 10 aŭ malpli. 23 personoj havas ankaŭ esperantistan edz(in)on. (La aliaj toleras.) Ankaŭ 18 gepatroj kaj 9 frat(in)oj parolas Esperanton. Krome estas kelkaj aliaj familianoj (gekuzoj, bogefratoj) kun kiuj nia esperantisto povus paroli Esperanton. Ni feliĉu — ĉar ekzistas familioj, en kiuj ĉiuj parolas Esperanton! 16 personoj skribis tion. Tamen ni ne forgesu, ke tiu ĉi nombro ne nepre signifas 16 familiojn apartajn!

La naŭa demando petis informojn pri ŝatokupoj en libertempo. Mi konsideris tri respondojn en vicordo. Legado estas la plej populara, poste muziko, ĝardenumo kaj sportoj, trikado kaj aliaj 'inaj' manlaboroj. Vojaĝado, turismo kaj lingvolernado, ankaŭ Esperanto, sekvas. Tiuj rilatas al lingvoj inklude Esperanto.

Pri la lernado de Esperanto

La deka demando *"En kiu jaro vi esperantistiĝis?"* estas grava. Tiuj, kiuj jam dum pluraj (6-8) jaroj okupiĝas pri Esperanto verŝajne scias pli multe pri la movado mem, konas pli da samideanoj, eble partoprenas en la movado aŭ alimaniere povis uzi sian lingvoscion de Esperanto ol tiuj, kiuj havas nur kelkjaran sperton pri Esperanto. Jen la divido en Tabelo 2.

Tabelo 2

Inter 1990-91 =	33	demanditoj esperantistiĝis,
1988-89 =	104	"
1985-87 =	51	"
1980-84 =	61	"
1970-79 =	58	"
1950-69 =	50	"
1930-49 =	8	"
kaj antaŭ 1929 =	10	"

10 personoj ne indikis la jaron kiam ili esperantistiĝis. La dua, la elstara nombro '104' reprezentas ĉefe (80%) mezlernejanojn, kiuj ekkonis kaj komencis lerni Esperanton en la mezlernejo. La du plej malgrandaj nombroj reprezentas la plej maljunajn. Tion konfirmas la fakto, kiu montriĝas el la esploro de la aĝdivido. La unuaj du nombroj sen la mezlernejanoj reprezentas la plej "novajn" esperantistojn. Al mi ilia nombro ŝajnas

sufiĉe malgranda. Ĉu malpli da homoj esperantistiĝis dum la pasintaj 3 jaroj? Eble jes, sed ankaŭ eblas, ke enketiloj ne atingis tiom multe da komencantoj, ĉar ili eble ankoraŭ ne aniĝis en iu ajn Esperanto organizaĵo. La plej 'produktivaj' jaroj estis la 80-aj jaroj. Kial? Mi havas eblan hipotezon, kiun klarigi mi volas citi O. PRINCZ, kiu en 1989 esploradis, inter aliaj, kial forlasas esperantistoj la movadon: "...nur iomete estas pli granda la nombro de la aniĝantoj ol la eksiĝantoj. Se tiu tendenco ĉe ĉiuj anoj estus sama, averaĝe la esperantistoj estus anoj de asocioj nur 6-8 jarojn." En Tabelo 2 tiuj nombroj estas la plej altaj, kiuj reprezentas homojn esperantistiĝantajn antaŭ ne pli ol 10 jaroj.

La sekva demando estas tre grava pro movada kaŭzo. Ĝi donas informon de kie venis la ideo lerni Esperanton. Vidante la respondojn oni kapablus prilabori strategion por propagando. Nur kvar personoj forgesis indiki la ĝustan literon. Male la aliaj, kion montras Tabelo 3.

Tabelo 3

La ideo venis pere de

- familio	= 28
- konato, amiko	= 116
- organizo (ekz.lernejo)	= 110
- amaskomunikilo (radio,televido,revuo,afiŝo)	= 53
- eldonaĵo de HEA	= 17
- alia	= 47

Sufiĉe multaj homoj ricevis la ideon de la familio. Tio ankaŭ montriĝis ĉe la sepa demando, kie ni vidis kiom da familianoj ankaŭ parolas Esperanton. Ĉi tion tamen ne subtenas la datumo, laŭ kiu nur kvar personoj efektive lernis la internacian lingvon de sia familiano. La dua datumo estas la plej signifa laŭ mia opinio. La plimulto de la demanditoj kaptis la ideon pere de persona rilato. Kompare kun la aliaj datumoj tio signifas, ke ankaŭ la personeco de la peranto gravas, ne nur la ideo. Oni ofte aŭdas la esprimon "komunumo de esperantistoj aspektas kiel granda familio." Nun ni povas diri tion ne nur pro tio, ĉar esperantistoj ne estas multnombraj, sed ankaŭ pro tio, ĉar tiom multaj el ili kaptis la ideon de amikoj, konatuloj. Samtempe 30 personoj skribis, ke ili lernis la lingvon de amikoj. Tiun nombron mi trovas alta, ĉar kutime oni bezonas iun devigon por lerni ĝisfine ion. (Ĉi tie 'ĝisfine' signifas lerni Esperanton ĝis almenaŭ mezprogresa nivelo.) Tion oni malofte ricevas de amikoj, prefere de iu organizo. Sufiĉe granda cifero staras apud la organizo. La plimulto de tio signifas iun lernejon de la tri tipoj. 103 el ili — verŝajne — lernis Esperanton en lernejo! La kaŭzo de pli malalta nombro ĉe komunikiloj rezultiĝas de ilia malofta prezentado koncerne Esperanton. Mi pensas pri amaskomunikiloj unuavice. Tio estas financa problemo. HEA-eldonaĵoj eble ne atingas multajn homojn. Inter aliaj 'fontoj' estas kelkaj interesaj: kelkaj hazarde trovis iun libron aŭ revuon, kvin homoj el libro de Nemere (NEMERE Ist-

ván, hungara verkisto, publikigas romanojn, sciencfikciajn literaturaĵojn ankaŭ en Esperanto.), aliajn konvinkis ilia instruisto, kolego, eĉ subleŭtenanto. Kelkajn kaptis propagando de Fiŝklubo kaj UTAZÁS '83 (ekspozicio je vojaĝeblecoj), aliajn mem interesis lingvostudado kaj komencis interesiĝi pri eblecoj por lerni Esperanton.

La lernanton influas ne nur la personeco de la instruisto, sed ankaŭ la medio en kiu li/ŝi lernas. Kie oni lernas Esperanton en la nuna Hungario? Kutime en organizita kurso laŭ nia datumaro 192 (52%) kaj en lernejoj, kiel mi jam menciis, sed ankaŭ en kluboj (Fiŝklubo ekzemple), inter amikoj, de familiano, en somera kurso, kaj memkompreneble hejme sole el libroj.

Kiom longe oni lernas Esperanton? Ĉu pruveblas, ke Esperanto vere estas facile ellernebla? Se ĝi estas facila, tiam averaĝa homo scipovas ellerni ĝin dum pli mallonga tempo ol aliajn fremdajn lingvojn. Mi ŝatus citi ĉi tie SZERDAHELYI (1979), kiu okupiĝis ankaŭ pri tiu ĉi demando. Jen kion li konstatis: *Laŭ miaj mezuradoj la sukces-koeficiento, atingita en hungaraj lernejoj en la instruado de diversaj lingvoj proporcie montras la suban skalon:*

rusa lingvo	- 30%
germana lingvo	- 40%
angla lingvo	- 60%
Esperanto	-130%.

Esperantistoj ĝenerale pasigas ne pli ol tri jarojn por lerni la lingvon. (Nur malpli ol triono de tiuj estas lernejanoj.) Tion mi konsideras mallonga tempo. Memkompreneble tio ankaŭ dependas de la ofteco de la lernado, de aĝo kaj de tio, kian nivelon ili atingis. Ni jam parolis pri la aĝdivido. La aliajn kondiĉojn mi pritraktos sur la sekvontaj paĝoj. Nur kelkaj bezonas pli multajn jarojn, eĉ se 208 (55%) personoj skribis, ke ili ankoraŭ lernas la lingvon. Do, 89 (24%) kun interrompoj. Inter tiuj, kiuj lernas la internacian lingvon pli ol 5 jarojn, multaj skribis, ke ili esperantistiĝis iam, kaj ili daŭre perfektigas aŭ refreŝigas sian lingvoscion. Tio ĉi ne signifas tiom intensan lernadon, t.e. ne supozas multe da novaĵoj. La elstara nombro, 25 ne estas signifa, ĉar ankaŭ la intervalo estas larĝa. (Elekto de intervaloj estis arbitra.) Ĉi tiujn datumojn ni povas vere pritrakti, se ni scias kiom ofte ili lernas Esperanton. Ni ekscias tion el Tabelo 4. Multaj personoj (55) ne kapablis taksi la tempon. Mi pensas, ke la du plej grandaj datumoj reprezentas esperantistojn, kiuj lernas la lingvon en organizita kurso aŭ en iu lernejo. Mi ne scias, ĉu ili konsideris ankaŭ la tempon de preparado por la lecionoj (ekz. skribado de

Tabelo 4

28 personoj okupiĝis	ĉ. 1 horon semajne pri Esperanto
115	2 "
73	3 "
30	4 "
14	5 "
19	6 "

hejmtaskoj). Min iomete surprizis la lastaj du datumoj. Mi trovas ilin sufiĉe altaj, ili devas esti tre entuziasmaj homoj, se ili pasigas kvin aŭ ses horojn semajne per io, kio ne estas deviga. Sed ekzistas eĉ pli entuziasmaj! Mi atendis pli altan nombron en la unua vico. Mi pensis pri homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, sed ankaŭ havas multajn aliajn zorgojn. Mi supozis, ke ili lernis la bazon de la lingvo kaj perfektigas ĝin en praktiko. La samon mi rilatigas al tiuj 25 personoj, kiuj lernas la lingvon laŭ monata ofteco kaj al tiuj 55% (208), kiuj skribis, ke ili ankoraŭ lernas la lingvon. Mi ne atendis tiom altan nombron. Tio pruvus la malon de la facileco de la lingvo. Mi pensas, ke ne estas tiom multaj ĉiamaj komencantoj. Lernejanoj donas nur trionon de la nombro. Samtempe mi atendis pli multajn (89=24%) jesajn respondojn je la demando, ĉu ili interrompis sian lernadon. Se io ne estas deviga, oni pli frue ĉesas ĝin por io pli grava kaj post iom da tempo ili eble rekomencas aŭ daŭrigas. Per tioma lernado ili atingis diversajn nivelojn laŭ Tabelo 5.

Tabelo 5

	en konversacio	en teorio (gramatiko,stilo)
komenca	116	96
mezprogresa	139	162
progresa	115	111

La proporcion en konversacio mi trovas natura. Pli malpli trionon nombras ĉiuj grupoj. Sed vidu la proporcion ĉe teorio! Pli multaj konsideras sin mezprogresaj koncerne teorion. 25 personoj konversacias komencnivele kaj scias la teorion mezprogrese. 15 personoj parolas en mezprogresa nivelo, sed kapablas kompreni jam ankaŭ literaturaĵojn.

Opinio pri Esperanto kaj ĝia uzo

Kion Esperanto povas oferti por tiu, kiu komencis lerni la internacian lingvon? Ni vidu la respondojn en vicordo en Tabelo 6!

Naŭ personoj ne respondis. La unua kolumno estas la plej signifa. Verdire mi ne atendis tiun altan nombron ĉe la unua ebla respondo. Mi atendis kaj ricevis grandan nombron ĉe la praktikaj celoj. La duan kaŭzon multaj elektis kiel la unua kaj ankaŭ kiel la dua. Inter la "aliaj" kaŭzoj multnombra estis tiu, kiu devenas de mezlernejanoj, por kiuj Esperanto estis deviga. (Ne por ĉiuj.) Kvar homoj

Tabelo 6

	1.	2	3.
mi volas, ke ĝi fariĝu la mondlingvo	147	31	14
min interesas la esperantista komunumo	65	66	6
por praktikaj celoj (vojaĝado ktp)	76	41	27
familiano konvinkis min	14	8	4
por profesiaj celoj	28	16	13
alia	61	26	17

diris, ke ili volas bone scii almenaŭ unu fremdan lingvon. Dekdu homoj interesiĝas ĝenerale pri lingvolernado inkluzive Esperanton. Iu bezonis ĝin al doktoreco, iu volas disvastigi ĝin, iu intencas nobligi homojn per ĝi, iu nur volis provi kvintagan superintensan kurson. Aliaj simple enuis aŭ volas sin evoluigi, pligrandigi sian memoron. Kelkaj provas amikiĝi helpe de Esperanto, ekzemple per korespondado. Iu vidas eblecon en ĝi por solvi globajn problemojn, iun konvinkis sia instruisto aŭ kolego, alia volas esti ano de tiu "granda familio" kiel mi jam menciis. Inter ĉi tiuj kaŭzoj kaj celoj estas ne nur idealismaj, sed ankaŭ pli praktikaj. (SYMOENS (1984) donas al ni historian komparon: "Antaŭ la dua mondmilito, multaj homoj esparantistiĝis, ĉar ili ne havis ĉiujn distraĵojn, pri kiuj ili nun disponas: radio, televido, aŭtomobilo, futbalo, vojaĝoj, ktp. Sed ni konstatas forŝovon de la interesiĝo pri Esperanto. Almenaŭ en Okcident-Eŭropo la 'popolo' forlasis Esperanton, sed ni nun rimarkas multe pli da interesiĝo ĉe kleruloj, intelektuloj, en universitataj medioj, eĉ ĉe kelkaj politikistoj, homoj, kiuj multe pli konsciiĝas pri la gravaj lingvaj problemoj en Eŭropo kaj la mondo. La 'popolo' ne okupiĝas pri tiuj problemoj, kaj ĝi antaŭe esperantiĝis parte pro idealismo, parte pro distro, pli simple, sen tro pripensi la problemaron." Ekzemple iu ŝatus pligrandigi sian kolekton de poŝtmarkoj aŭ bezonas ateston de ŝtata lingvoekzameno por la abiturienta ekzameno aŭ por priakcepta ekzameno.

Ni jam vidis la kaŭzojn, kial oni komencis lerni Esperanton, nun ni ekscias kio estas ilia celo per Esperanto. Sufiĉe multaj homoj, 45 (12%) ne respondis. La celon, kiun mi atendis esti la unua kaj plej ofta, pli ol triono de la demanditoj (137=37%) elektis, nome tion, ke ili volas vojaĝi kaj konatiĝi eksterlande helpe de Esperanto. Ankaŭ laŭ mi tio estas la plej utila aspekto de la lernado. La duan lokon okupas la ŝtata lingvoekzameno kiel celo. Tio estas utila por tiuj mezlernejanoj, kiuj devas fari la abiturientan ekzamenon kaj volas provi iun priakceptan ekzamenon. Ĉirkaŭe 6% (21) volas nur amuziĝi per Esperanto, alia 6% planas disvastigi la lingvon kaj instrui ĝin. Preskaŭ la sama proporcio identiĝis kun la ideoj kaj celoj de la movado. Proksimume 4% lernas Esperanton pro ĝia simpleco, facila lernebleco. Nur 11 personoj havas profesian celon per Esperanto. Tio ne estas surpriza, ĉar faka uzado de la lingvo ne estas disvastiĝinta, eĉ en multaj terenoj de scienco terminologio nur nun estas ellaborata. (Fakterminologio estas fiksita en fakvortaroj por ĉ.50 sciencaj disciplinoj.) Nur kelkaj fakoj esceptas, ekzemple tiu de fervojistoj kaj tiu de kuracistoj (bedaŭrinde nur unu kuracisto resendis enketilon.) Po ok personoj volas simple uzi ĝin (kie ili povas) kaj plilarĝigi sian horizonton, klerecon. 7 homoj serĉas pli da eblecoj por legado, aliaj du eĉ tradukas literaturaĵojn. 3 personoj lernas Esperanton ĝuste por tio, ke en la futuro ili pli facile lernu aliajn fremdajn lingvojn. Mi ricevis tri interesajn respondojn: iu lernas ĝin por sportaj celoj (t.e. uzi ĝin en sportaj eventoj), alia ŝatus konatiĝi kun homoj interesiĝantaj pri lingvoj kaj la tria persono lernas la internacian lingvon por

lingva egaleco. Oni tuj povas observi, ke komencaj celoj kaj nunaj celoj kelkfoje koincidas.

Post la celoj de la individuo ni vidu la celojn de la komunumo! La elekton povas multe influi la konoj pri la ekesto de la lingvo, pri Zamenhof kaj la movado. Laŭ niaj demanditoj jen la celoj de esperantistoj en Tabelo 7 (ili povis elekti pli ol unu):

Tabelo 7

Laŭ 58 homoj: ne ekzistas unueca celo – al ĉiuj diversaj
" 183 " : paco – interkonsento inter nacioj
" 16 " : partopreni por la movado mem
" 147 " : lingva egaleco
" 166 " : facile lernebla komuna lingvo
" 197 " : amikiĝo, interrilatiĝo.

11 personoj ne respondis. Nur kelkaj homoj pensas, ke esperantistoj agadas *l'art pour l'art*, t.e. nur por fari ion. La unuan celon — kiu estas malo de komuna celo — relative malmultaj elektis. Ili preferas konsideri esperantistojn kiel individuojn.

BLANKE (1977) diras, ke Esperanto kiel ĉiu lingvo mem ne estas ideologio kaj ankaŭ ne esprimo de iu ideologio. Ĝi estas instrumento de la komunikado. Sed laŭ mi Esperanto, la lingvo mem enhavas ion nedisigeblan. Esperanto estis kaj estas facile lernebla lingvo. Esperantistoj ne nepre devas adopti esperantismon, sed plimulto de esperantistoj aprobas ĝiajn celojn. Tiuj unuaj du celoj, kiuj ricevis la plej multajn voĉojn havas komunan aspekton, la lasta ŝajnas pli persona, sed la dua vere spegulas la internan ideon. Tamen ne nur idealaj celoj, sed ankaŭ la praktika celo — la kvina — ricevis multajn voĉojn.

Ankaŭ multaj konsideris lingvan egalecon grava. Ĉi tiuj rezultoj klare montras la komunajn aspektojn. Troviĝis ankaŭ ekstremoj: laŭ iu esperantistoj serĉas la vojon (ĉu al Dio?), laŭ alia, difektitoj trovas akcepteman kolektivon.

Ne sufiĉas konscii la celon, sed oni devas koni la vojon al la celo. El tiu ĉi vidpunkto opinioj ege diferencas. Krom 36 homoj, kiuj ne malkovris sian opinion 129 (ĉ.34%) demanditoj opinias, ke Esperanto devus esti instruata devige. Ĉi tiu vorto 'deviga' pleje vekas negativajn sentojn. Tamen la proporcio ŝajnas alta. Praktiko — historio de Esperanto ĝis nun — evidente montris, ke memvole nur malmultaj homoj komencis lerni la lingvon. Multaj (147=39%) konsideras propagandon nesufiĉa. Nur 38 homoj (10%) pensas utila, se ni aplikus Esperanton en laborejoj. Tiu malgranda nombro respegulas tiun fakton, ke Esperanto tre malofte estas uzata en fakaj terenoj. 94 personoj (25%) fortigus la movadon. Pli ol duono de la demanditoj (196=52%) pensas, ke interkonsento inter nacioj helpus efike.

Ĉirkaŭ 20% (74) eĉ ankoraŭ havas iom 'idealisman' imagon pri la forto de ekzemplodono. Originalaj solvproponoj ne forlasiĝas: fakultative instrui, propagando per radio kaj televido, per pli da mono, apliki Esperanton en pli multaj terenoj, en tekniko, komputiko, internacia ekonomiko, organizi konferencojn, tendarojn, ĝi fariĝu la laborlingvo de UN ktp.

Mi demandis esperantistojn, ĉu ili ŝatus se Esperanto fariĝus la mondlingvo kaj kial. La hipotezon, laŭ kiu esperantistoj volas disvastigi la lingvon kaj ĝin farigi la mondlingvo, ili pruvis, eĉ ankaŭ la kaŭzojn. 108 (29%) vidas avantaĝon en la fakto, laŭ kiu Esperanto estas facile lernebla komuna lingvo. 75 homoj (20%) opinias, ke interkonsento inter nacioj estus la plej grava beno helpe de Esperanto. Al ĉi tio ligiĝas lingva egaleco, kiu ricevis 50 (13%) voĉojn. 39 (10%) homoj emfazis la interrilatigan forton de la lingvo. 36 personoj jesis sen klarigo, 22 ne respondis (surprize!) kaj 5 neis sen ekspliko. Jen kolekteto el la kialoj de la aliaj: Esperanto perdus sian familiaran karakteron; ĉie oni estus komprenata; ne necesus tradukistoj, interpretistoj; ĉiuj devus lerni nur unu lingvon; pli simpla estus la mondo; ktp.

La dudekunua demando estas unu el la plej gravaj. Temas pri uzado de la lingvo. Ĝenerale hungaraj esperantistoj uzis la internacian lingvon en iamaj socialistaj landoj. Tio estas komprenebla, se ni konas la historion de Hungario dum kelkaj pasintaj jaroj. Antaŭ tri jaroj okcidentaj landoj komencis ĉesi postuli vizon. Tio faciligis vojaĝadon. Sed ni iru en vicordo! Pli ol 44% ankoraŭ ne uzis Esperanton ekster lernejo. La nombro reprezentas gejunulojn, kiuj ankoraŭ ne estas sendependaj, kvankam ili partoprenis en poemrecita konkurso kaj en organizita kampado. Nur 22% de esperantistoj korespondas kun samideanoj. Mi atendis pli multe. Korespondado estas sufiĉe facila kaj malmultekosta formo de interrilatiĝo. Eksterlandaj rilatoj formis signifan parton de celoj. Sufiĉe multaj homoj (70) povis partopreni en esperanto-kongresoj. Partopreno en iu organizita komunuma evento (kunvenoj, kampado, ktp) donas la plej grandan proporcion. Ankaŭ vojaĝado mem gravas kaj nombras sufiĉe alte (64=17%). Kiel mi jam diris inter la demanditoj kaj inter esperantistoj estas multaj instruistoj. Do, relative multaj skribis pro tio, ke ili uzas la lingvon en la klaso. Kelkaj demanditoj mem ne vojaĝas, sed gastigas aliajn, dum ĉiĉeronado en sia urbo ili ekzercadas la lingvon. Aliaj babiladas esperante kun amikoj. La du plej malgrandajn nombrojn donas tiuj, kiuj povas uzi Esperanton en sia profesio aŭ familio.

Respondoj je la dudekdua demando informas nin ne pri esperantistoj mem, sed pri la opinio de ilia ĉirkaŭantaro. Ni devas supozi, ke ĉi tiu ĉirkaŭantaro scias iom pli multe pri Esperanto ol averaĝa homo. Mi petis la demanditojn indiki la du plej karakterizajn opiniojn. Jen la divido en Tabelo 8.

Tabelo 8

112 aprobas,
101 respektas,
122 estas interesata,
80 ne estas interesata,
109 pensas pri mi: ekstravaganculo,
87 ridetas,
33 provas malkonsili min,
58 malkomprenante observas.

Estas interese, ke la plej altaj nombroj apartenas al la 'pozitivaj' opinioj (la unuaj tri). La esprimo 'ekstravaganculo' estas ambigua, ĝi povas esti kaj pozitiva kaj negativa, eĉ samtempe. Ankoraŭ multaj ridetas, t.e. pensas pri ĝi, ke ne estas serioza afero. Bonŝance malmultaj agadas kontraŭ Esperanto. Ili ne vere kontraŭas la ideon, sed ili pensas, ke oni kapablus fari ion pli utilan anstataŭ ĝi. Mi ricevis 53 aliajn respondojn. Jen kelkaj el ili: neesperantistoj ne vidas ĝian sencon aŭ rezulton; ili ne povus uzi ĝin ĉie eksterlande; estas interese, sed ĉu uzebla? kelkaj interesiĝus, se ili ne devus lerni ĝin; ege multaj pensas, ke la angla aŭ la germana lingvo estas multe pli utila nuntempe kaj Esperanto ne havas ŝancon kontraŭ ili; ili respektus, se oni povus uzi ĝin en praktiko; opinias, ke ĝi estas nur hobio; kelkajn helpas ekz. kun gastoj aŭ en la instruado; aliajn malhelpas; aliaj ne kredas en ĝi. Unu maljunulon liaj amikoj eksigis el sia rondo. Malantaŭ de ĉi tiuj negativaj opinioj estas la fakto, ke Esperanto ankoraŭ ne estas sufiĉe disvastiĝinta kaj ili ne volas surpreni la rolon de pioniroj. Sed ni trovas ankaŭ alian faktoron, ĉar al mi evidentiĝis, ke eĉ la ĉirkaŭantaro de esperantistoj ne bone konas, pri kio ili opinias. Kelkaj personoj skribis, ke ĉiujn ajn opiniojn li/ŝi jam alfrontis. Ekzistas homoj, kiuj simple estas indiferentaj. Mi ankaŭ serĉis korelacion inter uzado de la lingvo kaj la opinio de ĉirkaŭantaro. Mi trovis, ke kaj tie, kie esperantistoj skribis, ke ili ankoraŭ ne uzis la lingvon, kaj ĉe iu ajn formo de uzado la unuaj tri, favoraj opinioj altas. Inter la aliaj opinioj ĉe tiuj, kiuj ankoraŭ ne uzis la lingvon iom plinombras tiuj, kiuj ridetas pri la afero. Tio ĉi fortigas la jam menciitajn, nome tion, ke homoj kutime kontraŭas ne la ideon, sed la utilecon de Esperanto.

Nun ni vidu la movadon! 191 esperantistoj skribis, ke ili partoprenas en la laboro de la movado. Tamen ni ne tro alte taksu la datumon! Mi sendis multe da enketiloj al HEA-komitatanoj. 'Partopreno en la movado' ne signifas la samon al ĉiuj. Iu persono skribis, ke eĉ tiu fakto, ke oni uzas la lingvon, ne signifas, ke li/ŝi partoprenas en la movado. Do, vidpunktoj varias. Multaj personoj helpas organizi kunvenojn, partoprenis iun konkurson. Aliaj pere de instruado fortigas la movadon. Kaj aliaj havas oficialan funkcion ekzemple en la komitato. La dua datumo koncerne ĉi tiun temon estas ege grava. 106 personoj indikis, ke ili ne partoprenas en la movado, sed volonte enmiksiĝus. Jen iom da espero por la futuro! Samtempe 65 homoj ne volas partopreni en movadaj aferoj, al 14 el ili mankas tempo por tio, al kelkaj Esperanto estas nur hobio kaj ili ne havas seriozan celon per ĝi. Interese estas, ke la plej multaj el tiuj, kiuj ne volas partopreni, estas needz(in)igitaj; la plej multaj, kiuj partoprenas, havas familion, sed sen-propra-familiuloj plinombras ol la aliaj en emo de partopreno. Ĝenerale tiuj partoprenas en la movado, kiuj bone scias la lingvon.

Kiom esperantistoj konas unu la alian? Feliĉe, 212 (57%) havas amikan rilaton al samideanoj (persona aŭ koresponda). Tiu ankaŭ pruvas la esprimon, ke esperantistoj formas unu grandan familion. 66 personoj havas nur konatulojn helpe de Esperanto. Ili konas unu la alian el kunvenoj ekzemple. 37 homoj havas eĉ esperantistan kolegon! Sed bedaŭrinde 56 (15%) ne havas ri-

laton al samideanoj. Memkompreneble tiuj havas bonan rilaton al samideanoj, kiuj sufiĉe bone parolas la komunan lingvon. Ekzistas rekta rilato inter la du faktoroj.

Scio de aliaj fremdaj lingvoj

Ĝenerale tiuj personoj, kiuj lernas Esperanton, ankaŭ interesiĝas pri aliaj fremdaj lingvoj kaj ne nur interesiĝas, sed ankaŭ parolas iujn. Mi demandis esperantistojn pri scio de aliaj fremdaj lingvoj por kompari kun Esperanto.

La plej multaj lernis du fremdajn lingvojn krom Esperanto. Tio estas komprenebla, se ni scias, ke en Hungario estas devige lerni almenaŭ du fremdajn lingvojn en mezlernejoj. Dum la pasintaj jardekoj unu el ili kutime estis la rusa, ĉi tio ŝanĝiĝis nur antaŭ 2 jaroj. Sufiĉe multaj indikis nur unu alian lingvon krom Esperanto. Tio reprezentas tiujn lernejanojn, kies dua fremda lingvo estas Esperanto. 59 homoj parolas tri aliajn fremdajn lingvojn kaj eĉ troviĝas aliaj inter esperantistoj, kiuj parolas sep aŭ ok lingvojn.

Kie ili lernis aliajn fremdajn lingvojn kutime? Ĉu same kie Esperanton? Bedaŭrinde ne, ĉar oni lernas ĉi tiujn lingvojn en iu lernejo kaj ni vidis, ke la plej multo de esperantistoj lernis la internacian lingvon en organizita kurso. Eĉ ne estas tiom multaj Esperanto-instruistoj kaj lernejanoj ne volas lerni Esperanton, ili aŭ iliaj gepatroj preferas la aliajn lingvojn. La plej ŝatataj lingvoj estas la angla kaj la germana, kiuj estas instruataj en la plej multaj lernejoj. (Pri tio mi jam parolis.) Kiel estas atendite, la plej grandan nombron donas la tri tipoj de lernejoj ĉe lernado de la rusa lingvo. Dum la pasintaj kvar-kvin jaroj pli kaj pli da lernejoj trovis kaj dungis instruistojn de aliaj fremdaj lingvoj, nome de la angla kaj la germana. Samtempe multaj homoj lernis ĉi tiujn du lingvojn ankaŭ ekster la lernejo kun privata instruisto en iu kurso aŭ hejme aŭtodidakte. Krom la angla kaj la germana oni facile trovas eblecon por lerni la francan, la italan, la latinan kaj la hispanan. Lernado kaj lingvoscio ne estas la sama afero. Kvankam multaj lernis eĉ plurajn lingvojn, ne estas certe, ke ili bone parolas ilin. Estas interese ekscii kian nivelon homoj atingis. Memkompreneble la plej multaj homoj komencis lerni iun lingvon, sed pro io ili ne atingis eĉ la mezprogresan nivelon. Tiu fakto estas vera ĉe ĉiuj lingvoj. En Britio bazan nivelon atingis multaj, malpli mezan kaj eĉ malpli altan. La stato estas la sama. Ni memoru, ke multaj skribis ĉe la kialoj kaj celoj, ke ili volas bone scii almenaŭ unu fremdan lingvon. Ni vidis, ke ĉirkaŭ unu triono de la demanditoj indikis la progresan nivelon de sia lingvoscio de Esperanto. Tio estas bonega rezulto kaj pruvas la facilecon de Esperanto. Mi devas diri, kion preskaŭ ĉiuj hungaroj scias, ke kvankam ni lernis la rusan lingvon dum multaj (4-11) jaroj, ni ne bone kapablas paroli ĝin. Tion klare spegulis la respondoj. Nur 11% indikis la progresan nivelon je sia lingvoscio de la rusa. (22% estis je tiu de la germana.)

Kial oni preferas lerni la anglan aŭ la germanan anstataŭ ekzemple Esperanto? Ĉar oni povas uzi ĉi tiujn lingvojn en pli multaj terenoj de la vivo. Ni

vidu kie! Kiel turistoj la plej multaj uzis la germanan, poste la rusan kaj la anglan. Tio kompreneblas pro geografia situo de nia lando. Multaj korespondas kun ruslingvanoj, nur poste kun germanlingvanoj kaj anglalingvanoj. Relative malmultaj personoj uzis ĉi tiujn lingvojn en kunvenoj! Ni memoru, ke uzado de Esperanto estis la plej altnombra ĉiokaze. En profesio, kaj tiu ĉi ege gravas laŭ mi, la germanan povas uzi la plimulto de la demanditoj, la dua estas la rusa kaj la tria la angla. (La kvara estas la latina!) Inter amikoj kaj parencoj ankaŭ la germana estas la plej populara, poste la angla.

Post tiom da spertoj mi demandis, kiun lingvon ili konsideras la plej utila ĝenerale kaj al si mem. La respondoj donas tiun tendencon, kiun mi atendis, sed el la ĵus menciitaj ne evidentiĝis. La plej multajn voĉojn ricevis la angla lingvo kiel la plej utila lingvo ĝenerale. Laŭ mi tio estas respegulo de sociaj imagoj. Kvankam pli multaj lernis la germanan, pli multe uzis la germanan, tamen pli multaj konsideris la anglan kiel la plej utila. La germana estas la dua kun malmulta diferenco. La trian lokon okupas la rusa! Vane oni ne sufiĉe bone lernis ĝin, vane la plej multaj ankoraŭ ne uzis ĝin, vane ligiĝas al tio negativaj sentoj pro politikaj kaŭzoj, homoj pensas ĝin utila, pli utila ol la latina, la franca aŭ la itala. Estas ankaŭ rimarkinde, ke al si mem esperantistoj konsideras la germanan kiel la plej utila (tio rekte rezultas el la antaŭaj demandoj), la dua estas la angla denove kaj la tria la rusa denove surprize.

Antaŭ ol mi donas la rezulton de la demando, ĉu unu lingvo helpis lerni la alian, mi ŝatus citi SZERDAHELYI (1979) pri lia sperto: "Estas konata fakto, ke ĝenerale la lernado de la unua fremda lingvo estas malfacila tasko, tiu de postaj, per la ĉiam kreskanta elasteco de la lingvokapablo, estas jam multe pli facile alirebla. Esperanto, kiu ĝisminimume reduktas la komencajn malfacilaĵojn estas eminenta enkonduko al la instruado de aliaj fremdaj lingvoj. Tion atestas nombraj interesaj kaj sukcesaj eksperimentoj kaj en eksterlando kaj en nia lando. Tiuj lernantoj, kiuj tute ne sukcesis en la lernado de la rusa lingvo, kvankam ilin gvidis elstara instruisto, post kelkmonata Esperanto-lernado montris subitan progreson en la rusa lingvo." Unue ni vidu la staton, kiam oni lernis alian fremdan lingvon unue kaj Esperanton poste. Kutime la scio de la germana kaj la angla lingvo helpis la homojn en ilia Esperanto-lernado. Same la latina, la franca kaj la rusa. Ni ne surpriziĝu, ja la vortprovizo de ĉi tiuj lingvoj tre similas, ili rezultigas pozitivan transferon. Nur la rusa lingvo malsimilas, tion montras, ke mi ricevis neojn, kies proporcio al la jesoj estas preskaŭ du trionoj.

Lingvistoj kaj lingvoinstruistoj plue interesiĝas pri tio kiel Esperanto efikas al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj. Ĉu Esperanto helpis lerni iun fremdan lingvon? Mi atendis multajn jesajn respondojn kaj jen kion mi ricevis: Ĉe la lernado de la angla lingvo post Esperanto neaj respondoj estas triono de la jesaj! Laŭ mi tio estas granda proporcio, al mi tio ĉi ne pruvas la hipotezon. La stato estas iom pli bona ĉe la germana lingvo. La neaj respondoj estas unu

kvarono de la jesaj. Sed la plej malbona estas ĉe la rusa: preskaŭ egalajn jesajn kaj neajn respondojn mi trovis. Tamen, pro la jam menciitaj, tio estas komprenebla. La plej bonan proporcion montras tiu de la franca kaj la latina lingvoj. Tio ankaŭ estas natura, ĉar la vortprovizo de Esperanto pleje similas al tiuj de ĉi tiuj du lingvoj. Memkompreneble pozitivan aŭ negativan transferon influas ne nur la karakterizoj de la lingvoj, sed ankaŭ la medio en kiu oni lernis ilin, la metodoj ktp.

5. Konkludo

Sur la antaŭaj paĝoj mi pritraktis la motivojn kaj celojn de hungaraj esperantistoj. La komunumo de esperantistoj vere aspektas kiel granda familio. Tion pruvis rezultoj, kiujn ni vidis: esperantistoj havas amikan rilaton inter si, uzas la lingvon en kunvenoj, volus disvastigi la lingvon, prenis la ideon de amiko-konato, profunde interesiĝas pri interkonsento inter nacioj, ktp. Pli praktikan aspekton la datumoj montras nur en tio, ke ili volus uzi Esperanton en ekonomiko, en fakaj terenoj, sed nun ĉi tio ankoraŭ ne eblas. Pro la manko de tiuj ĉi multaj homoj ridetas je esperantistoj kaj eĉ, se ili interesiĝas pri Esperanto, ili ne emas lerni ĝin, ĉar ĝi ne estas sufiĉe disvastiĝinta. Ili timas, ke ili ne povus uzi la lingvon. Pro tio mi pensas, ke en la futuro la nombro de esperantistoj ne multe kreskos, se entute kreskos.

6. Bibliografio

Zs.Barcsay: Instruado de Esperanto en lernejoj 1991/92, Hungario (manuskripto)

D.Blanke: Pri la stato de la internacia aplikado de Esperanto. En: Esperanto: Lingvo movado instruado Red. D. Blanke, Berlin: Kulturbund der DDR, 1977

Esperanto La internacia lingvo sciencaj aspektoj. Red. D.Blanke. Berlin: Kulturbund der DDR, 1979

P.G.Forster: The Esperanto Movement. The Hague: Mouton Publishers. 1982

J.Leyk: Sociologio de la ingvo, socilingvistiko, interlingvistiko. En: Esperanto La internacia lingvo

O.Princz: Motivoj de Esperantistiĝo. En: Budapeŝta Informilo 1989/11-12

A. Rátkai: Deklaritaj celoj de la Hungaria Esperanto-Movado. En: Strategiaj demandoj

S.Révész: Esperantio. En: Strategiaj demandoj

Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo. 1-a Internacia Simpozio. Varsovio 1984.04.24-28

E.Symoens: Nova strategio por pli efika informado en la Esperanto-movado. En: Strategiaj demandoj

D-ro I.Szerdahelyi: La didaktika loko de la internacia lingvo en la sistemo de lernejaj studobjektoj. En: Esperanto La internacia lingvo

Baza vortprovizo de Esperanto cele al instruado

Josef DÖRR

Resumo de magistriĝa laboraĵo ĉe la Universitato Eötvös de Budapeŝto

Enkonduko

Ĉar Esperanto estas malofte ies gepatra lingvo, la esperanto-komunumo ricevas novajn adeptojn preskaŭ nur per instruado (aŭ memlernado). De ĝi dependas la pluekzisto de la lingvo, tial la esperanto-komunumo nepre devas zorgi pri la instruado de sia lingvo: tiu instruado estu ampleksa kaj celkonscia.

Instrucele oni devas segmenti la vastan kaj kompleksan lingvomaterialon. La segmentoj estu en si mem organizitaj sistemoj, taŭgaj por servi kiel komunikiloj. Kion ni instruu unue kaj kion poste?

La bazaj elementoj de Esperanto estas la morfemoj. La 205 strukturaj morfemoj de Esperanto estas:

103 unuelementaj vortoj kiel la numeraloj, personaj pronomoj, prepozicioj, konjunkcioj, interjekcioj kaj aliaj;
40 afiksoj (10 prefiksoj kaj 30 sufiksoj);
17 finaĵoj;
45 tabelvortoj.

Tiuj 205 morfemoj apartenas nepre al la **baza didaktika minimumo (bdm)**, kvankam oni ne instruas ilin ĉiujn jam komence.

Mi esploras la aliajn morfemojn (vortojn) de Esperanto por trovi bazan vortprovizon de la lingvo cele al instruado.

I. De la unuaj Esperantaj vortolistoj al Plena Ilustrita Vortaro

La unua esperanto-vortlisto troviĝas en la unua libro de Lazaro Ludoviko Zamenhof kiu aperis en 1887. Ĝi entenas 922 radikojn inklude la tabelvortojn, finaĵojn kaj afiksojn.

Je tiu tempo vorto-listo de lernolibro kaj vortar(et)o estis la sama afero, sed precipe la tradukantoj bezonis pli kaj pli da novaj vortoj. La vortaretoj fariĝis memstaraj kaj ĉiam pli dikaj.

La Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (SAT 1970.) fine ampleksas 1303 paĝojn al kiuj aldoniĝis 45-paĝa suplemento en 1987.

Do jam delonge la esperanto-instruistoj kaj -metodikistoj devas limigi la vorto-provizon instrucele.

II. Komparo de vorto-listoj de Esperanto-lernolibroj

En la dua ĉapitro mi komparas la vorto-listojn de 12 nuntempe vaste uzataj lernolibroj (la aŭtoroj estas bone konataj esperanto-verkistoj, i.a. Auld, De Diego, Szilágyi), kaj la rezultojn de kompara studo de lernolibroj de Balla K. En ĉiuj 13 libroj estas kune 2818 diversaj vortoj, el tiuj nur 18 vortoj estas en ĉiuj 13 libroj. 1040 vortoj estas en nur unu el la cititaj vorto-listoj.

La fakto, ke 1040 vortoj el entute 2818 vortoj estas nur en unu el la 13 libroj, estas jam forta argumento por la neceso de pli science trovita baza vortprovizo cele al instruado.

Oni povas supozi, ke la 18 vortoj kiuj estas en ĉiuj 13 libroj estas kandidatoj por eniri la bdm-on. Male, ĉe granda nombro de la 1040 vortoj, kiuj estas nur en unu libro, oni rajtas dubi pri tio.

Komparu la rilatojn de la tuta vortprovizo de la unuopaj aŭtoroj al tiuj 1040 vortoj:

aŭtoro	vortoj entute	vortoj nur ĉe tiu aŭtoro
Balla	1794	325
Chaves	1772	282
De Diego	835	91
Szilágyi	731	34
Pettyn	1035	147
Auld	555	28
Childs-Mee	392	2
Wingen	421	3
Thiery	323	36
Zagreb	470	4
Butler	261	3
MacGill	756	72
Ludwig–Triolle	389	3
		1040

Kiel ekzemplojn el tiuj 1040 vortoj mi citu: *dazip* (sudamerika mamulo)
gujav (frukto de sudamerika arbo)
gvaran (brazila pastro)
apterig (nov-zelanda birdo)
eĉ ne-pivaj vortoj estas, ekzemple: *ĉajot.*

Ni tamen bezonas ankaŭ vorton por tiu sudamerika mamuleto (*dazip*), sed en la internacia **bdm** ĝi ne estu.

III. Oftecaj listoj de Esperanto

Oni jam delonge disponas pri oftecaj listoj por la instruado de etnaj lingvoj. La ideo estas, ke pli oftaj vortoj estas ĝenerale pli gravaj instrucele. Laŭ la kalkuloj de GUIRAUD la unuaj 100 vortoj konsistigas 59%-ojn de iu ajn teksto, la sekvaj 1.000 vortoj kromajn 27 %-ojn, la sekvaj 3.000 denove 11,5 %-ojn.

Ĉe Esperanto la radikoj estas neŝanĝeblaj. Estas do logike enkonduki en la Esperanto-lernolibrojn por komencantoj la plej oftajn radikojn.

Tamen la afero ne estas tiel simpla. La ofteco de unuopaj vortoj dependas jam de tio, ĉu temas pri skriba aŭ parola lingvo. Ĉe la skriba lingvo gravas la jeno: ĉu lingvo de gazeto, de romano, de poemo, kaj oni rajas tuj demandi: de kiu gazato? de kiu romano? kaj de kiu poemo?

La uzataj radikoj kompreneble varias laŭ aĝo, profesio, nacieco, sekso, religio, edukiteco ktp. de la aŭtoroj. Gravas ankaŭ la tempo: lingvo de hodiaŭ aŭ lingvo de antaŭ 100 jaroj?

Por havi relative fidindan bazon por la kvanta esploro de iu lingvo, oni bezonas grandan kaj varian eltiraĵon. Helmut MEYER ekzemple esploris eltiraĵon de plej variaj germanaj tekstoj ampleksante 10 milionojn da vortoj. Tiaj sciencaj monumentoj en Esperanto ankoraŭ ne ekzistas.

Mi komparas la listojn de Leo BLAAS, Joachim DIETZE kaj Zlatko TIŜLJAR ellasante la 205 jam antaŭe menciitajn strukturvortojn kiuj nepre apartenas al la baza didaktika minimumo.

Leo BLAAS analizas po unu paĝo hazarde elprenita el ĉiu paĝcento de pli ol 100 verkoj elektitaj sen prefero. Sed la bazo de 50 000 vortoj ege malvastas kaj ĝi reprezentas nur literaturan lingvon.

Joachim DIETZE bazas siajn esplorojn sur politikaj, kulturpolitikaj kaj popolsciencaj tekstoj el esperantaj gazetoj.

Zlatko TIŜLJAR esploras la parolatan Esperanton. Lia listo baziĝas sur 25.000 vortoj.

La komparo montras, ke la unuopaj oftecaj listoj estas mankohavaj kaj inter si sufiĉe diversaj.

Post ĉiuspecaj listigoj en mia laboraĵo aperas je la paĝo 171 la laŭnombra resuma tabelo:

lerno-libroj	vortoj	oftecaj listoj 3	2	1	sume (oft.list.)	mankas
13	18	18	-	-	18	--
12	50	44	4	2	50	--
11	63	48	10	5	63	--
10	66	42	13	8	63	3*
9	88	47	21	16	84	4
8	68	23	23	17	63	5
7	96	39	23	21	83	15
6	135	32	39	37	108	27
5	179	30	42	59	131	48
4	238	27	43	69	139	99
3	289	12	46	85	143	146
2	488	9	37	132	178	310
1	1040	1	31	156	188	852
0		2	30	229	261	
	2818	374	362	836	1572	1507

*ni legu: en precize 10 lernolibroj estas komunaj 66 vortoj. El tiuj 42 estas en 3 oftecaj listoj, plus 13 en 2 oftecaj listoj, 8 nur en 1 ofteca listo: sume 63. 3 mankas en la oftecaj listoj.

Jen morfemoj en ĉiuj 13 lernolibroj:

ali- don- kelk- nom- sid-
atent- est- loĝ- pet- vol-
aŭd- far- lok- plen-
bon- hav- mult- rid-

IV. Konkludoj

1. La vortolistoj de la unuopaj lernolibroj forte diferencas laŭ la nombro de la vortoj: dum la vortolisto de la libro n-ro 2 (CHAVES) entenas 1772 vortojn, la vortolisto de la lernolibro n-ro 11 (BUTLER) entenas nur 261 vortojn. Unu el la multaj eblaj kialoj por tio povas esti, ke la celoj de la unuopaj aŭtoroj estas diversaj. Dum BUTLER ekzemple celas la minimuman vortprovizon cele al komunikado, CHAVES celas al pli profunda kono de la lingvo kaj tial bezonas pli da vortoj.

2. La damaĝo al la rezulto estas relative malgranda, ĉar la plej gravaj vortoj devus esti en ĉiuj listoj. Se la aŭtoroj uzus komunan bazan vortoprovizon, la 261 vortoj de BUTLER devus esti en ĉiuj listoj.

3. La fakto, ke 1040 el entute 2818 vortoj nur estas en unu el la 13 vortolistoj supozigas, ke eĉ inter niaj plej gravaj pedagogoj ne ekzistas konsento pri la pedagogia graveco de multaj vortoj. Kompreneblas, ke la listo de CHAVES (entute 1772 vortoj) entenas 282 de tiuj 1040 vortoj, sed eĉ la listo de THIERRY, kiu ampleksas nur 323 vortojn, entenas tamen 36 de tiuj 1040 vortoj.

La vortoprovizo de la 13 vortolistoj estas eble ofte elektite laŭ intuicia takso de la verkinto. Ĝi ĝenerale baziĝas sur subjektiva sperto, kiu ne estas tute neglektebla, sed tamen kondiĉita de la nacilingva kaj nacikultura medio de la koncerna verkisto. La 1040 vortoj, kiuj nur estas en unu el la 13 verkoj jam estas forta argumento tiurilate. Kvankam la unuopaj oftecaj listoj estas mankohavaj kaj inter si sufiĉe diversaj, la ciferoj de la resuma tabelo montras okulfrapan kongruon kaj regulecon.

Mi esploris kelkajn fermitajn sistemojn kiel ekzemple la monatoj de la jaro, la sezonoj, la tagoj de la semajno kaj konstatas, ke ĉiuj membroj de la menciitaj fermitaj sistemoj estas en la suma listo. Ni povas eĉ konstati, ke ili estas sufiĉe kohere reprezentitaj laŭnombre.

Ofteco ĝenerale kongruas kun graveco, ekzemple la radiko *monat-* estas en la vortolisto de 9 libroj, *maj-* nur en 7; *monat-* estas pli grava, ĉar oni povas difini: *majo* estas la kvina *monato* de la *jaro* (ankaŭ *jar-* estas en la vortolisto de 9 libroj.)

Spite la relativan malkoheron de la esploritaj unuopaj listoj, ilia sumigo estas valora por la prijuĝo de la unuopaj vortoj: oni nepre bezonas tiujn 18 vortojn, kiuj estas en ĉiuj 13 listoj kaj samtempe en ĉiuj 3 oftecaj listoj. Male, granda parto el tiuj 852 vortoj, kiuj estas en nur 1 el la 13 listoj kaj samtempe en neniu el la 3 oftecaj listoj, ne apartenas al la didaktika minimumo. Tio validas ankaŭ por la 220 vortoj, kiuj estas en 1 ofteca listo, sed en neniu el la 13 vortolistoj.

Konstateblas ankaŭ tio, ke en tiu suma listo de la 2.818 vortoj enestas jam la granda plimulto de la plej gravaj vortoj.

Sume

Inter niaj plej gravaj pedagogoj ne ekzistas konsento pri la baza vortprovizo de Esperanto cele al instruado.

La sumigo de la esploritaj 13 vortolistoj kaj de la 3 oftecaj listoj estas valora por la prijuĝo de la unuopaj vortoj. La ĝenerala regulo estas: ju pli ofta, des pli grava.

La suma listo de ĉirkaŭ 3.000 vortoj entenas pli-malpli la ĝenerale uzatan vortostokon el kiu oni elsarku vortojn laŭ certaj kriterioj (valento, disponebleco, universaleco k.a.) por ricevi la bazajn kaj fine la minimuman vortoprovizon de Esperanto cele al instruado.

Tio estu la temo de alia laboraĵo.

Metiejoj

La lingvo kiel ilo

Johan Hammond ROSBACH (Norvegio)

En Sarpsborg, la urbo, kie mi loĝas, oni starigis la unuan en Norvegujo lernejon por senlaboruloj, kiuj deziras instruadon. Ili turnas sin al la „laboroficejo" por povi aliĝi al la instruado, kiu estas senkosta por la kursanoj.

La estraro de la lernejo turnis sin al mi, demandante, ĉu min interesas instrui la fakon „La lingvo kiel ilo". Mi demandis, kiaj instruplanoj ekzistas, kaj oni respondis, ke tiaj tute ne ekzistas. Tiam mi tuj akceptis la proponon.

La menciita fako estas elektebla fako, kiel oni nomas ĝin. Ĝi daŭras ok semajnojn kun trihora leciono unu tagon en ĉiu semajno. Por mi estis escepte interesa tasko konstrui uzeblan kadron, kiu donu, se ne laŭdindajn rezultojn, almenaŭ utilan scion pri la lingvo, kiun oni uzas, ofte senpripense kaj malzorge, preskaŭ nur por interkomuniki, scion, kiu ebligu ankaŭ bazon por pli sobra apliko de la nacia trezoro.

Mi neniel pensas, ke mi trovis la idealon, sed imagas, ke ankaŭ la spertoj faritaj en tre agrabla instrumedio, inter homoj de 25 ĝis 40-jaraj, kiuj neniam aŭ preskaŭ neniam vere interesiĝis pri la lingvo aŭ pri ties esprimeblecoj, povus interesi kaj eble utili al aliaj, kiuj interesiĝas pri la temo.

La parola lingvo estas la praa. Tial estis logike komenci per ĝi. Milde karikaturante la diversajn pozojn de prelegantoj, mi sukcesis — feliĉe! — elvoki la bonvolan humoron: tiu parolanto montras la „patran pozon" kun antaŭbruste plektitaj brakoj, tiu alia pli similas al la moŝta Duko de Edinburgo, kun la brakoj ĉiam surdorse, kaj la tria, per sia lokado de la manoj, eble plej memorigas pri timida nudisto.

Post tio mi trovis la tempon matura por prezenti ĝustan kaj malĝustan prononcojn de multaj vortoj kaj malĝustaj esprimoj. Ĝuste tiu ero de mia instruprogramo vekis la plej grandan intereson, kaj oni deziris, ke mi vastigu la temon.

Elementa fonetiko montriĝis interesokapta. Unue ni studis la vokalojn kaj konsonantojn, trovante, ke aliaj lingvoj havas aliajn vokalojn. La konsonantojn ni studis laŭ ilia prononco: nazalojn, plozivojn, frikativojn ktp. La asimilado vekis intereson kaj oni konstatis, ke pli ol 50 procentoj de la lernantoj diras *[kromprinco]* anstataŭ *[kronprinco]*. Ni trovis ankaŭ la okazon konstati la multajn diversajn skribmanierojn de la sono *[ŝ]* en la norvega lingvo.

Sed la lernantoj devis ankaŭ memstare labori. Kiel instruisto mi rakontis historion, kiun mi interrompis en la plej grava punkto, kaj la partoprenantoj devis mem verki la finon. Ĉiuj poste voĉlegis siajn produktojn, kiujn komentis kaj ili mem kaj la gvidanto. Oni substrekis la erojn de sentoj, la manieron prezenti, kio okazis, kiel oni konstruis sian rakonton, kiel oni finis ĝin.

Poste sekvis sinonimoj. Trovu sinonimojn de *stor* 'granda'. Oni trovis, ke 'granda' povas signifi *granddimensia, grava, fama, intensa, altgrada* ktp. Por utiligi la konon de sinonimoj, la lernantoj poste devis trovi sinonimojn al multaj vortoj en la ĵus farita daŭrigo de la interrompita rakonto.

Jam la duan kurstagon mi atakis du gravajn temojn: tiun de elementa metriko kaj rimoj (vira kaj ina). La trian kurstagon nature sekvis aliteracio kaj ludo per vortoj kaj sonoj. Estis prezentitaj "poemoj" en diversaj lingvoj, kie oni uzas la karakterizajn sonojn, miksitajn kun veraj vortoj por atingi komikan efekton. Partoj el la angla kaj la germana montros la ideon:

"Why do you whasper might to me,
why do you tinger and why do you frake?
Sad in the hood, mad in the wood,
whasper and tinger,
why does the mittering hout in the sky
bait all the youk and tow evry spay?"

"Es schattet so wunderbar im Halle
wo Maimuss und Kailer zusammen
mit Mut und mit Meue benümmen
ein Drüsschen im schunkelden Rhein,
und Nixen mit Wichse und Lüppchen
wiegen und tanzen und singen dich ein."

Estis jam tempo por pli verkeca agado. Unue du humuraj historietoj estis prezentitaj. Tiujn la partoprenantoj devis dramigi, kreante replikojn de la personoj en la historietoj.

Poste la lernantoj devis agi kiel ĵurnalistoj senditaj de la diversaj gazetoj por referi prelegon por la legantoj. La prelego prezentita (de mi) kompreneble temis pri la Internacia Lingvo.

Ankaŭ universitataj studentoj referas, sed iliaj referaĵoj estas esence malsimilaj al tiuj de la ĵurnalistoj, unue, ĉar ili servas nur kiel memorigaj punktoj poste ellaborotaj de la studentoj, due, ĉar ili ne celas aliajn legantojn. Mi, kiu tiam estis "universitata profesoro", elektis temon, kiun mi — prave — supozis nekonata de ĉiuj "studentoj": la diferencon inter la malnovaj egipta kaj helena skulptartoj, temo, kiu, cetere, vekis grandegan intereson.

Poste sekvis foto, sur kiu estis stumpo de faligita arbo, apud kiu staras dujara knabeto. Surbaze de tiu foto la kursanoj devis verki poemon, novelon, sloganon aŭ reklamtekston. Vi verŝajne same surpriziĝos kiel mi, eksciante, ke ok el dekkvin partprenantoj verkis "poemon", utiligante tion, kion ili lernis pri metriko kaj rimoj! Bonege!

La tri lastaj verktaskoj estis jenaj: Infano kun bicikleto implikiĝas en trafikakcidenton. Kiel klarigis la infano al la polico pri la afero, kaj kia estis la raporto skribita de la policano?

La rakonto pri Kevenhüller en *Gösta Berling* estis prezentita. La kursanoj devis redoni la historion en la konservativa kaj eleganta lingvaĵo de Kare Willoch, iama ĉefministro, kaj en la longfraza, rapidlanga lingvaĵo de Go Harlem Brundtland, nuna ĉefministro. Kaj fine: la komenco kaj la fino de streĉa rakonto estis prezentita — kio okazis inter la komenco kaj la fino?

Kompreneble, ni ne ellasis liston pri la plej oftaj lingvaj eraroj, skribaj aŭ buŝaj. Montriĝis ja, ke pluraj el la partoprenantoj kredis la erarajn formojn ĝustaj!

Feliĉe ĉiuj estis tre kontentaj pri la kurso. Mi mem havis interesan eksperimenton,agrablan travivaĵon.

*****

Vizitu la Talento-Lernejon!

La ĉi-suban artikolon verkis instruisto de la fama Talento-Lernejo, funkcianta apud Budapeŝto (Hungario). Li invitas ĉiujn esperantistojn viziti la lernejon, kie ili povos renkontiĝi kun jam pli ol 30 infanoj intense lernantaj Esperanton.

El unika eksperimento estiĝis unika lernejo

La Talento-Lernejo estis fondita antaŭ kvin jaroj. La lernejo konsistis el unu klaso, tamen startis grandioza eksperimento. La instruado estis intensa kaj donis agrablan etoson. La infanoj tre bone fartis en la lernejo. La instruprogramo akcentis ĉefe matematikon kaj fremdajn lingvojn. Kiel enkondukan fremdan lingvon la infanoj lernis Esperanton. En la matematiko ili uzis la tradician japanan kalkulilon, sorobanon. Jam ĉe la fino de la unua lernojaro videblis la evoluo de la gelernantoj kaj evidentiĝis la sukceso. Post trijara eksperimento komencis la lernadon la dua klaso. Tie la laboro baziĝis sur la spertoj de la unua klaso. Ekde tiu tempo oni jam povas paroli pri vera lernejo kaj ne nur pri eksperimenta klaso.

Ekde septembro de la 1993a jaro Talento-Lernejo havas tri klasojn: unu unuan, unu duan kaj unu kvinan klasojn. Ĝi funkcias en sama konstruaĵo kiel la oficejo de Fondaĵo Talento, kiu subtenas la lernejon. Oni jam povis sufiĉe multe legi en diversaj ĵurnaloj pri la unua eksperimenta klaso de Talento-Lernejo, ja estis nova kaj interesa la eksperimento. Nun estas jam tempo skribi pri la dua klaso, kiu volas sekvi la ekzemplon de la heroa klaso. La dua klaso konsistas el dek tre entuziasmaj gelernantoj. Neniam en mia vivo mi vidis infanojn, kiuj tiel volonte vizitas la lernejon. Ili tre bone fartas en la lernejo kaj kuraĝe respondas al la demandoj de la instruistoj.

Antaŭtagmeze la klaso grandparte lernas en du grupoj aparte. Unu grupo lernas la hungaran lingvon, dume la alia lernas matematikon kaj konon pri la naturo. Unufoje dum semajno ili havas lecionon pri muziko. Posttagmeze la infanoj kune lernas Esperanton kaj sorobanon. Dum semajno la gelernantoj iras naĝi dufoje kaj unufoje gimnastiki. Do, ili havas riĉajn, interesajn posttagmezojn.

La gelernantoj tre ŝatas la matematikon. Tio estas vere interesa. La matematik-instruadon helpas la sorobano. Ĝi estas japana kalkulilo, kiu helpas infanojn logike pensi uzante tuj grandajn nombrojn. Do, miaj gelernantoj ne timas kalkuli per grandaj nombroj jam ekde la unua klaso. En la dua klaso la infanoj ne ĉiam uzas la sorobanon kaj en tiu kazo fakte nur imagas ĝin kaj rapide kalkulas. En la vendejoj oni ne povas trompi miajn gelernantojn.

Mi instruas por la gelernantoj la sorobanon Esperantlingve. Jen ekzemplo de leciono pri sorobano:

Hodiaŭ unu el la gelernantoj, M. estas instruisto. Li elektas la hodiaŭajn taskojn. Ĉiu prenas sorobanon, paperon kaj krajonon. M. sidas ĉe la instruista tablo kaj komencas: „Faru nulon... 91... minus 38 ... minus 51 ... plus 62 ... plus 18 ... skribu". Ankaŭ M. mem faris la taskon per sorobano kaj nun ĉiu skribas la rezulton. Sammaniere ĉiuj faras ankoraŭ 7 taskojn. Poste M. iras al la tabulo, ekstaras sur seĝon kaj tiel ĵus povas atingi la grandan sorobanon kiu pendas antaŭ la tabulo. Ĉiu prenas koloran krajonon. Mi diras la taskojn unu post la alia. M. faras ilin sole. La ceteraj gelernantoj rajtas komenti. Kelkfoje mi aldonas iom da ekspliko, kiam mi rimarkas, ke iu eraris kaj ne komprenas kial. Bonŝance M. estis bona instruisto kaj ĉiu samopinias pri tio. M. sidiĝas kaj mi iras al mia propra tablo. Ĉiu diras kiom da eraroj li aŭ ŝi faris. Nur kelkaj faris unu aŭ du erarojn.

Pri Esperanto kiom mi diru al esperantistoj? Jen ankaŭ ekzemplo el la praktiko: La infanoj prenas sur la tablon Esperanto-dosieron. Unue estas "Mi demandas, vi respondas", ripeto de antaŭe jam lernita materialo. La lernantoj devas traduki vortojn kaj frazojn aŭ respondi al demandoj, ĉion buŝe kaj rapide. Ofte mi donas poentojn, sed ne ĉiam. Por la ripetado mi i. a. uzas la rektan metodon el tre malmoderna dana libro: *Sub la verda standardo* de P. KORTE. Estas ĉiam malfacile trovi lernomaterialon por miaj junaj gelernantoj. Tre ofte mi mem kompilas materialon el diversaj libroj aŭ bultenoj. La buŝa ripetado finiĝis. Mi donas paperon al la infanoj dirante: "Vi faru frazojn. Bonvolu bele skribi ilin sur la paperon." Mi skribas sur la tabulon: "havas — plumo — Karlo — bela; pomo — ŝi — flava — manĝi — tri"; "...a ...o ...as ...ajn ...ojn", kaj aliajn laŭ tiuj ĉi tri ekzemploj. Fakte tio estas ideo el la libro de *Esperanto 1* de Szerdahelyi. La infanoj tre ŝatas tiun ĉi ekzercon. Kiam la infanoj estas pretaj, ni rapide tralegas la frazojn kaj korektas ilin, se estas bezonate. Restas nun ankoraŭ malmulte da tempo. Tempo por ke la infanoj memstare laboru. Ili prenas la libron *Esperanto por ni* de Helena kaj Jozefo MIKULÁS. Ili mal-

fermas ĝin, serĉas la paĝon kiun ili lastfoje prilaboris kaj komencas legi kaj plenumi la taskojn. Kelkaj infanoj jam laboras en la tria kajero, aliaj ankoraŭ en la dua libro. Dum ili laboras, ili rajtas peti mian helpon. Ofte mi lasas ke ili venu al mi, sed kiam mi rimarkas, ke iu jam devus koni ion aŭ ke iu volas esti ne "tro" diligenta, tiam mi referencas, kelkfoje kun indiko al iu paĝo, al la libro aŭ al la vortaro. Jes, ankaŭ okjaraj infanoj povas uzi vortaron. Eĉ ĝi estas sporto por ili. La tempo rapide forpasas nun. La infanoj fanatike prilaboras paĝon post paĝo... Mi tre ŝatus skribi pli pri miaj karuloj sed fakte... ĉu vi scias, kio estus plej bona por miaj infanoj? Ke ĉiusemajne unu el vi estu nia gasto en la lernejo! Do, entute elkore mi invitas ĉiujn esperantistojn, Hungarajn aŭ eksterlandajn, kiuj dum pli aŭ malpli longa tempo restadas en Hungario, viziti nin en la lernejo. Vi ege helpus kaj plezurigus nin. Krome, ni atendas la anoncigon de tiuj samaĝaj klasoj aŭ infanoj, kiuj ŝatus korespondi kun miaj gelernantoj... miaj volonte ankoraŭ dediĉus tempon por korespondi tutmonde. Neprekontaktu ilian instruiston:

Sjaak JANSEN
Talento-Lernejo
Budaörs, Pf. 102.
H-2041
Telefono:166-9866,186-8854
Telefakso:185-7183

Talento-Lernejo
en Budaörs (Hungario)
serĉas esperantistajn instruistojn pri diversaj fakoj (matematiko, literaturo, natursciencoj ktp.).

Ĉe la elekto de estontaj instruistoj avantaĝoj estas: kreativeco, diplomo pri Esperanto kaj pri mensokontrolo, intereso pri medio-protektado.
Kontaktu: LUKÁCS András laŭ la supra adreso.

Recenzoj

Gvidlibro pri Aŭtodidakta Lernado de Konversacio

Krizantemo, la fame konata, elstara japana esperantistino surprizis nin (almenaŭ min) per libreto, havanta la supran titolon. Vere, ĝi havas du titolojn: unu japan- kaj unu E-lingvan, ĉar la verko estas dulingva – en apudaj paĝoj legeblas la samenhava teksto en du variantoj, japana kaj Esperanta. (Vere, mi legis nur la lastan, ĉar, bedaŭrinde, mi ne konas la gepatran lingvon de la aŭtorino.)

La libreto kunigas du ĝenrojn: propagandilon kaj metodikan helpilon, ambaŭ por japanlingvanoj. En la unuaj ĉapitroj la verko strebas konvinki la leganton: indas lerni Esperanton, ĉar ĝi plej bone el la lingvoj servas la interkomprenon de diversnaciaj, diverslingvaj, diverskulturaj homoj, krome ĝi estas la plej rapide lernebla lingvo laŭ siaj fonetikaj kaj gramatikaj, eĉ semantikaj ecoj.

Post tiu ĉi propaganda parto venas la didaktika. Krizantemo volas doni helpon al japano, kiu sola aŭ kun malmulta helpo **okupiĝas** pri lernado de nia lingvo: konsilas komencan intensecon de la lernado, lerni regulojn, korekti erarojn, fari anstataŭigajn kaj transformigajn ekzercojn ktp. Gravan lokon en Krizantema metodiko okupas la diversaj legad-manieroj: "voĉlegado" (eĉ senvoĉe, se oni ne volas ĝeni aliajn homojn), legadoj "esprimriĉa" kaj "detala" kun "solo-aktorado" kiel bazaj iloj por sola alproprigi parolkapablon. Tamen, la libro fare de Krizantemo ne forgesas pri la uzado de sonbendoj, radio, registrilo kaj telefono (menciante, ke ĝi "kostegas longdistance").

Sed multe pli da loko ol pri tiuj teknikiloj Krizantemo ofertas al parola kaj skriba ekzercado, kiel "prelegado" aŭ "monologado" aŭ tradukado, dum kiu laŭ ŝi oni unue devas traduki, nur poste konsulti vortaron.

Tamen ĉe la fino de la libro la leganto devas kompreni: ĉiu aŭtodidaktado devas finiĝi per trovado de esperantisto kun kiu la lernanto povas ekpraktiki siajn memstare alproprigitajn kapablojn. Sed – konante la unuajn malfacilaĵojn de tiaj renkontoj – la aŭtorino konsilas: okaze de nekompreno fare de la partnero la lernanto kulpigu ne sin mem, sed la alian, por ne perdi memfidon. Ĉe la fino de la libro la aŭtorino mencias: tiuj metodikaj konsiloj estis donitaj laŭ propraj spertoj kaj plej grave: ĉiu mem devas akiri proprajn spertojn, surbaze de kiuj li/ŝi povas ekhavi proprajn lernometodojn.

Aparte interesaj estas en la libro la amuzaj karikaturaj ilustraĵoj kaj la "Eskapiloj" – konsiloj donitaj al japanlingvanoj por venki iliajn tipajn malfacilaĵojn. Min iom ĝenis en la teksto sole la – tipe japanaj – preseraretoj (ekz. "granvanta" anstataŭ grandkvanta, "kunctado" anstataŭ kunmetado) kaj similaj; krome kelkaj sintaksaj strangaĵoj (ekz.: "Voĉlegu aŭ per (?) sentoplene... aŭ per (?) plate rapide..."; aŭ "En la kazo de lernilo estas oportune elekti el parto 2-3 lecionojn pli antaŭa" anstataŭ "... elekti el parto pli antaŭa 2-3 lecionojn.".

Radozo

Nova eldono de *Ĵamborea Lingvo*

Post du oficialaj eldonoj (1968, 1969) kaj laŭnecesaj kopioj denove aperis – kun plivastigita enhavo – la esperantlingva lernolibreto por skoltoj: *Ĵamborea Lingvo*. La nova eldono nepre aktualas, ĉar la skoltaro estas preparanta sin por partopreni Eŭropan Ĵamboreon en 1994 kaj Mondan Ĵamboreon sekvajare, ambaŭ en Dronten, Nederlando. La baza ideo de la aŭtoro ŝajne estis konigi la skoltan vivon al la gejunuloj per instruado de la Internacia Lingvo.

La materialo de la libreto konsistas el 117 unuoj, alterne gramatikaj, laŭtemaj aŭ ekzercaj. (Oni ne ektimu pro la alta cifero de la lecionoj, la plimulto da ili estas nur kelkfrazaj.) La komenca unuo prezentas la ĉefrolantojn: la ses anojn de patrolo, kiuj akompanas nin tra la tuta materialo, helpante la komprenon kaj alproprigon de gramatikaĵoj aŭ vortoj kaj teoriaj aŭ praktikaj sciindaĵoj de la skolta vivo. La mallongaj gramatikaj unuoj enhavas nur unu gramatikaĵon sen klarigoj (tiun taskon la aŭtoro lasas al la instruanto), kun kelkaj ekzemploj en frazoj (-j; -ino; -n; Kia?; plej ktp). Iom pli longas la lecionoj, en kiuj estas komparo de gramatikaĵoj (-os, -as, -is; -anta, -ata, -onta, -ota, -inta, -ita; tabelvortoj plurfoje, kelkaj prepozicioj ktp). Aliaj unuoj donas informojn pri diversaj ĉiutagaj temoj (La familio; La poŝto) aŭ simple grupigas ties vortojn (Korpopartoj, Trinkaĵoj ktp).

Por la skolta lernantaro aparte gravaj kaj interesaj estas la lecionoj, kiuj donas informojn pri la skolta vivo (La skolta uniformo; Ĉifroj; La Morsa Kodo; La Skolta Devizo; La Skolta Leĝaro; La Skolta Mondo (gazeto); Skolta kaj Tenduma Terminaro (libro); SEL (Skolta Esperanto-Ligo).

La komprenon multe helpas sukcesaj desegnaĵoj de konata nederlanda grafikisto Melle Hammer, filo de la aŭtoro. Por klarigi la prononcadon servas aparte almetitaj folietoj kun plurlingva teksto. Agrabligas la lernadon kvar internacie konataj kantoj kun muziknotoj. Kaj nepre menciinde: nur kelkfraza, tamen informdona legaĵeto temas pri Esperanto kaj ĝia aŭtoro Zamenhof. Iu el la antaŭlastaj unuoj starigas la demandon: "Kial vi lernis la internacian lingvon?", kiun sekvas multaj respondoj, ĉe la fino eĉ instigo partopreni internacian tendaron.

La saman celon havas ankaŭ la aŭtoro – J. K. Hammer – kaj la eldonisto – Skolta Esperanto-Ligo –, kiun pruvas jena frazo sur dorsoflanko de la verdkolora titolpaĝo: 'Organizaĵoj en landoj kun ekonomiaj problemoj, kie aĉeto ne eblas, povas peti permeson por represo aŭ kopiado.'

La libreto taŭgas ankaŭ por memlernado kaj Ĉe-metoda instruado. La vendoprezo ĉe SEL: Nederl. NLG 6,00. Korespondadreso : Skolta Esperanto-Ligo, Postbus 433, 1500 EK Zaandam, Nederlando.

Perlo Miela

Hans GRASSEGGER: Asterixübersetzungen in Esperanto. Eine Studie zur übertragung von Sprachspielen.
(ASTERIKS-tradukoj en Esperanto. Studo pri la transigo de lingvoludoj)
SCIENTIA Band 28. Innsbruck 1992. 19 paĝoj. (germanlingva)

De kelkaj jaroj mi instruas studentojn de la angla lingvo en tradukaj seminarioj. La kursoj kapabligu al produktado de fremdlingvaj tekstoj (faktaj, fakaj kaj beletraj) surbaze de germanlingvaj konsiderante stilistikajn efikojn kaj necesajn ŝanĝojn pro diferencaj kulturaj cirkonstancoj. Ili inkludas ankaŭ la kritikan komparadon de ekzistantaj tradukaĵoj en diversaj lingvoj. Tiel unu el la seminarioj traktas ekzemple la ASTERIX-verkojn de Goscinny kaj Uderzo kaj ties tradukojn al la angla kaj germana. Tiuj ilustre montras la malfacilaĵojn de la traduka laboro.

En la franca originalo — krom la humurriĉaj eventoj dum la rakonto — komikaj efektoj originas el lingvaj kaŭzoj. La aŭtoroj mokas pri la strukturo kaj idiomo de la angla paroligante la britojn franclingve 'laŭ angla maniero', t.e. anglaj esprimoj kaj gramatikaj strukturoj aperas en maskerado per franca leksiko (ekz. *Quel morceau de chance* origine el *What a piece of luck*; *N'est-ce pas merveilleux?* kiel laŭvorta traduko de *Isn't it marvellous?*). Dum ke la germana tradukaĵo povas uzi similajn rimedojn, la tasko de la angla tradukanto estas multe pli komplika, ĉar la rezulto de ĝusta tradukado estus pli malpli korekta lingvouzo. Alia problemo estas la transformado de sociaj apartaĵoj kaj regionaj dialektoj. Sur ties fono kompara ekzamenado de traduko al internacia planlingvo — kiu ne konas regionajn kaj sociajn variantojn, kiu preskaŭ ne havas kolokaĵojn [1] — estas precipe interesa.

La studaĵo de Grassegger enhavas tian lingvistikan ekzamenadon de la esperantlingva versio de ASTERIX LE GAULOIS (tradukita de internacia tradukrondo). La libreto baziĝas sur prelego de la aŭtoro dum la kongreso '100 jarojn da Esperanto' en Vieno 1987. Grassegger estas lingvisto kaj specialisto pri lingvoludoj kaj tradukado de bildrakontoj. En *Sprachspiel und Übersetzung. Eine Studie anhand der Comic-Serie* ASTERIX (Tübingen 1985) li kompare analizis 26 ASTERIX-volumojn en 6 lingvoj.

Post lingvistika enkonduko pri la fenomenoj traduko, lingvoludo, ties difinoj kaj specoj, Grassegger ekzamenas la Esperanto-version ASTERIKS LA GAŬLO laŭ kvar ĉefpunktoj. Tiuj estas la traduko de

- propraj nomoj (ekz. Miraklomiks, Malmuziks)
- parolturnoj
- aliaj lingvoludoj (sonludoj - *Klangspiele*)

[1] Per tiu vorto mi volas karakterizi laŭsignife akordiĝantajn vortkombinaĵojn, en kiuj la senco de unu elemento estas konkretigita per la alia (ekz. *Freudiges Ereignis, happy event*)

(Ekz. france: *Il ne s'imagine pas à quel point je vais être* **loquace**! Je vais **loquacer** comme on n'a jamais **loquacé**!
komento paĝofina: Ça, ce n'est pas du français
Esperante: Li ne imagas, kiom **rakontema** mi estas! Mi **rakos**, kiel neniam oni **rakis**!
komento paĝofina: Tio ne estas Esperanto, sed Esp-o (p.12).

- interjekcioj kaj brupriskriboj (Holophrastische Äuerungsmuster)
  (Ekz.: Ŝmac! Maĉ! Maĉ! — Obeliks manĝas apron) (p. 14)

En la kvina ĉapitro 'Mondlingva neŭtraleco vs. nacilingva sentemeco' la aŭtoro ĉefe okupiĝas pri la karakterizado per 'fremdlanda prononcmaniero' en la nacilingvaj tradukoj. Li konstatas, ke tiu ĉi stilrimedo estas uzata ankaŭ en Esperanto, kie la tradukintoj en la sekva ekzemplo eĉ sukcesis aldoni homofonion:
BONBON, ni voriras: Zed adend(?)u, ni refenos! (p.16)
En la sesa, resuma ĉapitro Grassegger aprobas la lertecon de la Esperanto-tradukintoj kaj kelkajn stilrimedojn de Esperanto. Sed samtempe li konkludas, ke la eblecoj por lingvoludoj en Esperanto estas pli malgrandaj ol en la nacilingvoj, ĉar planlingvo ne povas havi la prioritatan celon taŭgi por ludoj.
Kvankam tiu ĉi fina deklaro estas sendube ĝusta, spertaj parolantoj de Esperanto scias, ke tiu planlingvo donas riĉajn okazojn precipe por lingvoludoj, kiel la verkoj ekzemple de Raymond Schwartz klare pruvas. Elirante el stilrimedoj de naci-lingvaj sistemoj oni verŝajne ĉiam konstatos, ke Esperanto multe atingas, sed esprimive malsuperas la nacilingvojn. Sed se oni prenas Esperanton mem kiel startopunkton, montriĝas, ke la planlingvo aliflanke posedas proprajojn, apartajojn — kiel ekzemple ege produktivan sistemon de vortfarado — kiuj ebligas esprimplenecon sen ekvivalentoj en naciaj lingvoj. Per aliaj vortoj rilate al la recenzita libreto: estus dezirinde pliampleksigi la studon, kiu baziĝas sur nacilingvaj kriterioj, per ĉapitro pri apartajoj de la Esperanto-traduko krom la priskribitaj fenomenoj. Tiu povus sin dediĉi ekzemple al vortfarajoj (france *Grimez-moi ça en Gaulois*! germane *Macht mir daraus einen Gallier!* esperante *Gaŭligu tiun!* — p.10 de la rakonto) aŭ al situaciaj proverbajoj superantaj la originalon kaj nacilingvajn tradukojn, kiel ekzemple:

france: *Les Romains n'ont pas les voeux en face de tous.*
germane: *Die Römer blicken einfach nicht durch!*
Esperante: *Peko kaj eraro estas ecoj de l'romianaro* ...(p.13)

france: *D'accord, mais ne me prends plus à rebrousse-poil!*
germane: *Gut! Du hast also ein Haar in der Suppe gefunden!*
Esperante: *Barbo potenca, sed kapo sensenca!*

Tamen, oni devas konsenti kun la aŭtoro en tio, ke ne sufiĉas analizi nur unu libron (ASTERIKS LA GAŬLO ja estas la unu-nura el la ASTERIX-volumoj ekzistanta en Esperanto) por prezenti ĝeneraligitajn tradukstrategiojn en bildrakontoj por Esperanto.
Mi bonvenigas la studon de Grassegger kiel lingvistikan kontribuon. Ĝia publikigo kadre de la serio SCIENTIA estas ĝojiga, ĉar tio donas la eblecon konatiĝi kun problemoj de tradukado en Esperanton kaj al ĝeneralaj lingvistikaj rondoj kaj al esperantistaj legantoj (almenaŭ germanlingvaj). Tamen ĝia apero havus pli grandan efikon en lingvistika ĵurnalo aŭ eble, en la memstara fakorgano pri esperantologio/interlingvistiko, kiu laŭ mi delonge necesas.

Sabine FIEDLER
Riesaer Str.5
D-04328 Leipzig

******

Lernejaj grupinterŝanĝoj

Instruante ajnan fremdan lingvon oni klopodas kiel eble plej multflanke demonstri la avantaĝojn de la majstrado de tiu lingvo, kiel eble plej diverse kaj efike motivadi la lernantojn al plua perfektiĝo. Unu el tiuj rimedoj povas esti ankaŭ reciproka vizito de klasoj aŭ studgrupoj el diverslingvaj landoj/regionoj.
Kelkloke tiuj interŝanĝoj havas jam longan tradicion, aliloke tiu formo de mondesploro nun komencas disvolviĝi. En Orient-Eŭropo ekzemple, post la politikaj ŝanĝoj ŝanĝiĝis ankaŭ la sinteno al fremdaj lingvoj: ĉiu volas alproprigi la arton komuniki en fremdaj lingvoj. La pasportaj kaj vizaj plifaciligoj aldonis la emon kaj la — tamen limigitan — eblon kontakti la kulturon de la lernata lingvo, konatiĝi kun ĝia komunumo. La limigoj devenas el la ekonomiaj cirkonstancoj: ekz. por la plejmulto de hungaraj lernejanoj pasigi kelkajn semajnojn en la lando de la lernata lingvo, estas daŭre nur revo. Do, kaj pro ideaj kaj pro praktikaj kialoj la klasinterŝanĝoj havas grandan altirforton.
Al la preparado kaj organizado de tiaj interŝanĝoj instige helpas la speciala numero de la internacia revuo de la instruistoj de la franca lingvo:

Le français dans le monde, numéro spécial: Pour une pédagogie des échanges [Cele al interŝanĝa pedagogio], febr.-marto 1994. EDICEF. 192 p.

En la unua ĉapitro estas traktataj la motivoj kaj celoj de interŝanĝoj. Analizoj de lernolibroj (lingvaj, historiaj kaj literaturaj) prezentas, kiajn bildojn la lernantoj povas akiri pri la cellando antaŭ la vojaĝo. Pri pluraj formoj de interŝanĝo raportas la sekva ĉapitro, ekz. pri kontakto per altteknikaj komunikiloj

kiel telefakso, videoleteroj. Tre interesaj estas la raportoj pri komuna aŭ paralela teatra prezentado de lernantoj el pluraj landoj. Oni elektis iun temon kaj prikonsideris ĝin el pluraj aspektoj ekz. *Studoj pri la komedio: antikva teatro; Latina teatro, commedia dell'arte kaj la franca komedio; Foira teatro, italaj kaj francaj komediistoj en la 18a jarcento; Rilato de majstro/servanto; Studo pri fabeloj* ktp. Alia tre interesa komuna okupo povas esti detala, plurtaga kaj multflanka studo de iu kultura heredaĵo, pri kiu formo same legeblas referaĵo. Interŝanĝo laŭ profesiaj kriterioj estas eble la plej praa tiuspeca rilato.

Kiam oni ekplanas iun interŝanĝon, la partoprenontaj gelernantoj komence estas ege entuziasmaj kaj entreprenemaj. Sed kiam proksimiĝas la dato de la renkontiĝo kun la Alia, pli-malpli fortiĝas timo de la nekonata, ekestas psikaj malcertecoj. La tria ĉapitro traktas tiun problemon, oni povas legi pri ĉiuspecaj limoj, pri la psikologia flanko de la lingva preparo ktp.

La lasta ĉapitro okupiĝas pri la interŝanĝo de instruistoj, same ekzamenante la temon sub diversaj aspektoj.

Povas esti tre intstrue tralegi tiujn 36 koncizajn studaĵojn por ĉiuj, kiuj planas estigi tiuforme internacian kontakton.

INTERNACIAJ KONTAKTOJ

AEDE (Eŭropa Asocio de Instruistoj) – 25.000 membroj en 16 landoj.
Organoj: AEDE NEWS kaj CONTEXT
Ĝenerala Sekretario: s-ro Guus Wijngaards, Koningsholster 64, NL-6573 VV Beek-Ubbergen
Internaciaj eldonaĵoj: s-ro Pierre Kernen, Long champs 42. CH-2014 Bole.

APLV (Asocio de la Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)
Organo: LES LANGUES MODERNES
19, rue de la Glacière F-75013 Paris

EUCLIDE
(Kunliga kaj Informa Centro por la Evoluigo de Eŭropaj Interŝanĝoj)
Lycée Jean Geiler de Kaysersberg
14, rue des Bateliers, F-67085 Strasbourg

EURELEM 2000 (Eŭropaj Lernejoj) – lernejaj kooperativoj
Organo: ANIMATION ET EDUCATION
101 bis, rue du Ranelagh F-75016 Paris

ATEE (Asocio por Instruista Trejnado en Eŭropo)
s-ino F. Vaniscotte
Rue de la Concorde, 60. B-1050 Bruxelles

Ne internacia, sed tamen similkaraktera interŝanĝo okazadas en plurlingvaj landoj kiel Svisio. Ĉi-aŭtune aperos senkompara [same franclingva] helpilo, el kies praktikaj konsiloj povos profiti ne nur svisoj:

Mireille GROSJEAN: *Les échanges de classes Clé en main* (Lernejaj interŝanĝoj. Ŝlosilo ĉemane), 280 p. A/4. Prezo: ĉ. 35 SF ĉe Office du matériel scolaire, rue des Tunnels 1, 2006 Neuchâtel, Svislando.

La aŭtorino prezentas unue la kulturajn, lingvajn, psikologiajn kaj pedagogiajn aspektojn (21 paĝoj), poste la diversajn tipojn de interklasaj kontaktoj, la etapojn de la organizado. Estas aldonitaj eĉ modelleteroj al gepatroj kaj aliaj dokumentoj.

La ĉefa parto konsistas el la priskribo de proks. 55 agadformoj uzeblaj en grupoj de lernantoj kun diversaj kulturoj kaj lingvoj.

komo



Raportoj

Internacia Kongreso de Instruistoj pri Fremdlingvoj

En la kongrescentro en Hamburgo (Germanio) okazis kune la kongresoj de instruistoj pri fremdlingvoj, tiu de la germanaj instruistoj kaj la tutmonda, en la lastaj tagoj de la monato marto 1994. La instruistoj de Esperanto partoprenis ĝin.

En la preparlaboroj montriĝis malmulte sukcesaj la kontaktoj inter la pintoj de Germana Esperanto-Asocio kaj de la fakorganizaĵo de la instruistoj. La postaj intervenoj de lokaj prilaborantoj donis pli bonan rezulton. Ankaŭ tiam kunorganizanta instruisto pri fremdlingvoj deklaris, ke Esperanto troviĝas ekster la interesokampo de liaj samprofesiuloj. Tamen la klopodoj rezultigis la enmeton de prelego de d-ro Till DAHLENBURG (Brüel/Schwerin) en la kongresprogramon.

En la oficiala programafiŝo, en la kongreslibro (en grandaj literoj) kaj en la informslipo antaŭ la uzata salono troviĝis la anonco, ke tie prezentas siajn argumentojn "Germana Esperanto-Asocio" (en germana lingvo). Tio pruvas, ke la unuaj kontaktoj de tiu ĉi Asocio tamen restis en la memoro de la kongresorganizantoj. Kaj la vorto — tikla por la instruistoj de fremdlingvoj — "Esperanto", aperis oficiale.

La prelego altiris dekduon da aŭskultantoj; per tio ĝi apartenis al la malgrandaj kunvenoj, da kiuj estis multaj. D-ro Dahlenburg parolis pri Esperanto kaj ĝiaj ebloj en socioj de pluraj fremdlingvoj, do li pritraktis la situacion en la nuntempaj lernejoj kaj en la unuiĝanta Eŭropo. La avantaĝoj de la solvo de la lingvoproblemo per Esperanto fariĝis tute evidentaj.

Post la prelego kaj ioma diskuto la aŭskultintoj rigardis libroekspozicion disponigitan de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI), kies du estraranoj, sinjoro Michael SCHERM (Neu-Ulm) kaj sinjoro Eugen SCHNEIDER (Kolonjo) ĉeestis la kunsidon. Eĉ libroj estis venditaj, i.a. la nova franclingva verko pri Esperanto de Claude PIRON. La tuta aranĝaĵo daŭris unu horon kaj duonon.

La partopreno de esperantistoj en tiu ĉi kongreso montriĝis grava, ĉar la kongresanoj ne povis pretervidi la informon pri la sinprezento de "Germana Esperanto-Asocio", do ili vidis Esperanton kiel ĉeestaĵon dum pritraktadoj de instruistoj pri lernejaj fremdlingvoj. Ke tio estas tute komprenebla afero, tion nun scias la esperantistoj; la eksteruloj devas ankoraŭ lerni tion. Al tio kontribuis la ĉi-jara kongrespartopreno.

d-ro Werner Bormann
Scharstr. 26
21031 Hamburg
Germanio

Sukcesa jaro por la Komisiono de ILEI pri Lernejaj Konkursoj

Antaŭ du jaroj laŭ iniciato de la subskribinto estis akceptita propono fondi Komisionon pri Lernejaj Konkursoj. Tiam la Estraro de ILEI komisiis la iniciatoron funkciigi la Komisionon.

De tiam li plenumas sian taskon konsekvence, redaktante taskofoliojn, elektante taŭgajn tekstojn, multobligante testojn, presigas diplomojn, memorkartojn, havas senperan kontakton kun multaj instruistoj, eldonas informcele cirkulerojn ktp.

La rezulto povus esti eĉ pli imponaj, se ĉiu Landa Sekcio de ILEI konsiderus la konkursojn kiel siajn proprajn. Kelkaj el ili bedaŭrinde ne respondas, kiam la Komisiono serĉas ilin per alvoko aŭ propaganda materialo. Fari tion regule ne eblas, ĉar la gvidanto mem el propra poŝo financas la administrajn kaj poŝtajn kostojn, kio konsumas multan monon el lia modesta salajro.

La vivo mem atestas, ke la nova generacio lernanta nian lingvon en divergradaj lernejoj, multe bezonas eblecon prezenti sian talenton, ke ĝi soifas je sukceso en Esperanto. Feliĉe, de jaro al jaro, pli kaj pli da instruistoj de la internacia Lingvo rekonas la mobilizan valoron de la konkursoj. Mi esperas ke niaj ĉi-jaraj atingoj ne estis hazardaj, ke ili ekhavos novan elanon en septembro, komence de la nova lernojaro en la norda hemisfero.

Detale pri unuopaj konkursoj:

1. La plej grava, pro sia karaktero plej efika konkurso — kiu akompanas la geknabojn de septembro ĝis majo, do tra la tuta lernojaro — estas la *Internacia poentokolekta konkurso honore al I. Szerdahelyi*. Anstataŭ longe paroli mi prezentas specimene taskofolion kun solvo.

4a jaro, n-ro 7	*Ia KATEGORIO*	Limdato: la 25a de Aprilo 1994

1. Kompletigu! *(3 poentoj)*
Antaŭ la ...o ...as ...a ...o. Ĉu la ...o ...as ...o ...ŭ ...o?
Ankaŭ la ...o ...as ...a ...o.
2. Ĉu *-is, -igis, iĝis*? Kiu finaĵo mankas? *(3 poentoj)*
Ili pur... la fenestrojn. La patrino lav... la plankon. Mia horloĝo romp... .
3. Kie oni povas aĉeti vortarojn, fruktojn, panon? *(3 poentoj)*
4. Kial vi lernas Esperanton? (Skribu frazon kun almenaŭ ses vortoj!) *(3 poentoj)*
5. Oni invitis vin al kinejo. Rifuzu la inviton pro tempomanko! *(3 poentoj)*
6. Kiamaniere dividi 188 je du partoj tiel, ke la kvociento estu 1 ? *(2 poentoj)*
7. Kiu estis *Gaston Waringhien*? (Minimume tri informoj!) *(3 poentoj)*

La solvojn sendu al:

SOLVOJ, 4a jaro, n-ro 7 *Ia KATEGORIO*

1. *Antaŭ la* domo staras alta arbo. *Ĉu la* vulpo estas dombesto aŭ sovaĝbesto? *Ankaŭ la* biciklo estas utila objekto.

2. Ili purigis la fenestrojn. La patrino lavis la plankon. Mia horloĝo rompiĝis.

3. *vortarojn en librovendejo; fruktojn en fruktovendejo aŭ bazaro; panon en panvendejo*

4. Ĉar Esperanto estas bela, facila kaj utila lingvo.

5. Dankon pro via afabla invito, sed, bedaŭrinde, tiam mi ne havos tempon.

6. ~~188~~ = 1

7. *G.Waringhien estis elstara franca esperantisto, dum longaj jaroj prezidanto de nia Akademio, fama poeto, verkisto kaj lingvisto.*

Vi vidas ke la taskoj donitaj ĉiumonate kvankam ne estas malfacilaj, tamen bezonas regule certan tempon, kaj tiel formiĝas kontakto kun la centro kaj kun ĉiuj lernejoj, kie troviĝas rivaloj. La konkurso estas gravega motoro por adoleskantoj. Kune kun la nova taskofolio ili ĉiufoje ricevas ne nur la akutalan liston de la konkurso, sed ankaŭ la korektitajn solvojn. Ni ŝuldas apartan dankon la la redakcio de *Eventoj*, kiu de numero al numero aperigas la taskofoliojn kaj al la redaktorino de la Esperanto-programo de la Hungara Radio, kiu konsekvence, post ĉiu numero diskonigas la nomojn de la geknaboj troviĝantaj ĉe la pinto de la konkurso.

La redaktado kaj la korektado de la taskofolioj iras de lernejo al lernejo.

Fine de ĉiu lernojaro la Komisiono skribas dankleteron al la instruistoj, kies lernantoj partoprenis la konkurson kaj nacilingve al ĉiuj direktoroj, kies lernantoj akiris la unuajn lokojn aŭ daŭre konkursis (solvis minimume la taskojn de 5 numeroj).

Ĉi-jare partoprenis en la konkurso 282 geknaboj el Hungario, Kroatio, Hispanio, Francio, Ĉeĥio, Pollando, Rumanio, Finnlando.

Dank'al la estraro de HEJ, la gajnintoj de la 2a kategorio en la lastaj tri jaroj povis senpage partopreni en IJS. La ceteraj ricevis librodonacojn aŭ memorkartojn.

2. Plej longan, 5-jaran tradicion havas post si la *Tutlanda Deklamkonkurso* en Hungario *honore al J. Baghy*. Ĝian sukceson okulfrape prezentas ke jam la duan fojon partoprenis en ĝi ankaŭ kroatoj (Zagrebanoj). Ĉi-printempe el 18 loĝlokoj venis konkursantoj por intermezuri siajn talentojn en kvar kategorioj. La centro de la konkurso estas la Transdanubia urbeto Pápa, la bazlernejo Nagy László. La direktorino *Maria Köntös* kaj la instruisto-ĉeforganizanto

Jozefo Németh ĉi-foje ricevis honordiplomon pro multjara elstara, persistema laboro. La nivelo kaj la renomo de la konkurso kreskas de jaro al jaro.

3. La konkurso pri *Arta traduko honore al K. Kalocsay* por hungaraj lernantoj havas post si 4 jarojn. La konkursantoj tradukas helpe de dulingva vortaro Esperantan tekston en la hungaran. En du kategorioj (10–14-jaraj kaj 15–18-jaraj) partoprenas meznombre 100 geknaboj. La tradukaĵoj — kiuj estas faritaj la 6-an de oktobro (naskotago de K. Kalocsay) aŭ kelkajn tagojn pli aŭ malpli frue — estas korektataj unue de propraj instruistoj, kiuj poste sendas la plej bonajn verketojn al kvar sendependaj ĵurianoj. La fina rezulto estas anoncata okaze de la Zamenhofa Tago.

Mi opinias, ke tiu ĉi konkurso aŭ tutlanda deklamkonkurso en ĉiu lando povus vigligi la lernejan instruadon. Estus tre oportune se la naciaj ILEI-sekcioj prenus sur sin tiujn taskojn.

4. La plej nova konkurso estas tiu pri *Modela Esperanto- parolo honore al Ivo Lapenna*. En 1993 ĝi okazis por mezlernejanoj kaj partoprenis en ĝi sole hungaroj.

Ĉiu konkursanto havis du tekstojn: unu estis libere elektita, la alia – deviga por ĉiu, ricevita 10 minutojn antaŭ la prezento.

FINA REZULTO DE LA
INTERNACIA KONKURSO PRI MODELA ESPERANTO-PAROLO
honore al Ivo Lapenna

Ĉijare la konkurso rilatis bazlernejanojn. Partoprenis ĝin 13 gelernantoj el tri landoj. La ĵurianoj estis: Germain PIRLOT, Belgio (kaj sub lia nomo 6 aliaj el Nederlando [4], Ĉinio [1], Portugalio [1]), d-ino Ilona KOUTNY, Hungario kaj Andrzej PETTYN, Pollando.

I-a	Petro BAJZÁTH	Hungario
II-a	Hannah TELLIER	Britio
III-a	Timea KUBICZKI	Hungario
IV-a	Tivadaro SZAKÁL	Hungario
V-a	Tiberio KUPCSIK	Hungario

Laŭdoj:

Andrea NAGY Hungario	Suzana SZAKOS Hungario
Edita ÁRVAI Hungario	Matthen TELLIER Britio
Arora SAUVAGE Francio	Edmundo DERYCKE Francio

Fine, estas konstateble, ke la konkursoj evoluas kaj teknike kaj enhave, la regularoj ĉiujare estas reviziitaj kaj pribonigitaj laŭ la spertoj kaj rimarkoj de instruistoj. Ili estas kompareblaj kun konkursaĵoj de iu ajn lerneja konkurso, eĉ mi povas deklari ke laŭ formo kaj organiziteco ili estas de profesia nivelo.

Géza Kurucz, Gimnazio Julia Bányai
Nyíri út 11.
H-6000 Kecskemét

Mazi en Gondolando

Moderna profesi-nivela instru-materialo por infanoj kaj junuloj taŭga ankaŭ por plenkreskuloj

Adapto al Esperanto de BBC-instrufilmoj por infanoj:
Muzzy from Gondoland kaj *Muzzy comes back*

Internacia Esperanto Instituto planas la eldonon de tiu instru-cela vidbendo (180 min. en 12 partoj; ĉiu parto enhavos kelkajn scenojn kaj gramatikajn klarigojn) + Esperanto-lernolibro, internacie uzebla.

Temas pri simpatia kosma estaĵo, kiu vizitas Gondolandon kaj helpas solvi diversajn problemojn.

La produktado de la tuto okazos ĉe la firmao *Tommy Publishers* en Varsovio, Pollando, en kunlaboro kun du profesiaj filmreĝisoroj Roman DOBRZYNSKI kaj Piotr FRIEDRICH, la tekstojn kaj libron preparos Stefan MACGILL.

Por esplori la merkaton kaj starti la produktadon ni bezonas vian financan apogon. Krom donacoj, kiuj jam komencas veni, ni bezonos proksimume 800 antaŭpagitajn mendojn ĝis la fino de tiu ĉi jaro 1994. Planata finproduktado en somero 1995.

Antaŭpagantoj ĝis la fino de 1994 ĝuos jenajn avantaĝojn:

1. por ili la kompleto kostos nur 50 USD (aŭ egalvaloron laŭ aktualaj valutkurzoj, ekz. proks. 98 guldenojn); la posta vendoprezo estos pli alta;
2. ili ricevos numerigitan konfirmon; la unuaj 200 personoj ricevos kune kun la kompleto aldonan donacon en la formo de unu el la de IEI eldonitaj libroj (eblos elekti inter kelkaj titoloj);
3. ili ne pagos sendokostojn, ricevos la kompletojn laŭ la numeroj de la enpagoj.

Libroservoj kaj Esperanto-grupoj, kiuj antaŭpagos por pli ol 10 kompletoj ĝuos rabaton po 5%.

IEI volonte akceptos la pagojn kaj poste prizorgos la liveradon. Individuajn antaŭpagojn rajtas akcepti ankaŭ landaj E-libroservoj, kiuj poste, sed antaŭ la fino de 1994, sendu liston de enpagintoj kaj la enkasigitan monon al IEI.

Por la pagoj IEI destinis la poŝtbankan ĝirkonton 3653959 je la nomo de VR.v.h.IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag. Se oni pagos per banko, tiam necesos aldone pagi la bankkostojn.

Personoj/instancoj, kiuj havas konton ĉe UEA, povos transpagi sian kontribuon al la tiea konto de IEI: iein-q, tiamaniere evitante bankkostojn.

Poloj, kiuj ŝatus finance subteni la projekton, povas pagi al la konto ĉe PKO, O.M. Szczecin, nr. 81520-193773-170-4, je la nomo de s-ino Diodora KOLINSKA, ul. Szymonowicza 8, 71-482 Szczecin.

Sur la pagilo bonvolu indiki "Mazi-kurso" kaj "donaco" aŭ "mendo"; se temas pri mendo, tiam ankaŭ por kiom da kompletoj kaj en kiu video-sistemo: VHS-PAL aŭ NTSC.

Reagojn en la formo de demandoj, konsiloj, petoj, kritikoj, ktp. atendas la sekretariino de la projekto,

Mila van der Horst-Kolinska
InternaciaEsperanto-Instituto
Riouwstr. 172, 2585 HW Den Haag
Nederlando
Tel.+fakso: +31.70.3556677

***

Unesko kaj la projekto "Fundapax"

La unua rezolucio de Unesko favore al Esperanto estas de antaŭ 40 jaroj (Montevideo, 1954). Poste okazis la akceptoj de la Rezolucioj de Sofio (1985) kaj de Parizo (prezentita de Italio en 1993).

Ĝuste en Italio, krome, la Ministro pri Publika Instruado aktivigis Ministerian Enket-Komisionon, kiu konkludis siajn laborojn la 22-an de decembro 1993, deklarante sin favora al enkonduko de Esperanto en la italajn elementajn lernejojn.

Pro tiuj favoraj cirkonstancoj, en februaro 1994 Esperanto-Radikala Asocio, ligita al la transnacia Radikala Partio submetis al Unesko sian Projekton Fundapax, kadre de la t.n. Programo de Partopreno, petante subvencion de 26 mil dolaroj. (Informo el revuo *Esperanto.*)

Tiu ĉi projekto, je la unua fojo post kvar jardekoj, donas konkretecon al tiuj Rezolucioj, proponante la celon akceli la internaciajn komunikadon kaj komprenadon, la respekton al homaj rajtoj, la demokration, la pacon, jam ekde infanaĝo, pere de la uzado de la Internacia Lingvo — ordinare nomata Esperanto —, kiel lingvo havanta pacan signifon kaj lingvo didaktike helpanta al posta pli bona lernado de fremdaj lingvoj.

Tiun celon oni klopodos atingi pere de utiligo de novaj komunikiloj (informadiko kaj telematiko), kaj oni eldonos ankaŭ novtipajn lerno- kaj gvidlibrojn por infanoj kaj instruistoj, verkitajn far Elisabetta Vilisics-Formaggio. Estas planite krei reton de kvar ĝis dekses klasoj aŭ grupoj en almenaŭ dek landoj dum la lernojaro 94/95, kaj same reton de instruistoj, pretaj formi sin kiel "Fundapax-instruistoj" kaj deĵorantaj en Lernejo Asociita al Unesko aŭ pretaj peti al sia lernejo asociiĝon.

En la projekto kunlaboros: la Societo "Torre Argentina Società di Servizi S.p.A. Divisione Agorà telematica" (Romo, Italio), la Akademio Internacia de la Sciencoj, UEA kaj ILEI, Infanoj ĉirkaŭ la mondo.

Kunlaboru en la Fundapax-projekto

– Se vi posedas komputilon kun modemo kaj estas kunligita kun internacia komputila reto (ekz. Internet), vi povas fariĝi kontaktulo de la Fundapax-projekto, nome ricevi kaj transdoni informojn pri la okazantaj/okazontaj instru-eksperimentoj.

– Se vi estas instruisto elementlerneja kaj kapablas instrui Esperanton al infanoj, bonvolu anonci vian pretecon je kunlaboro.

– Se vi povas instrui Esperanton al elementlernejaj instruistoj dezirantaj fariĝi E-instruistoj por infanoj, bonvolu anonci vin.

– Se vi konas elementlernejajn instruistojn ne E-parolantajn, sed interesatajn lerni Esperanton por partopreni la eksperimentojn, sciigu al ni iliajn nomon kaj adreson.

Bonvolu anonci vian kunlaborpretecon sciigante vian kompletan adreson, kun telefon- kaj faks-numeroj kaj eventuale e-poŝta adreso, al:

Esperanta Radikala Asocio
Via di Torre Argentina 76
IT-00186 Roma; Italio
Tel. +39/6/689-791;
fakso: +39/6/68-80-53-96;
e-poŝto:E.R.A.@agora.stm.it

******

Seminario: frua lernado de lingvoj

Komence de majo 1994 en Kroatio okazis internacia seminario kies temo estis: "Frua eklernado de fremdaj lingvoj". Ĝin kunorganizis Eŭropa konsilio, Kroata Ministerio pri edukado kaj Zagreba Filozofia fakultato.

Dum kvar tagoj oni interŝanĝis spertojn pri la lernado de lingvoj en la aĝo de 8-10 jaroj. Estis prezentitaj pluraj lernolibroj, helpiloj, inter aliaj la antaŭ nelonge preparita instrufilmo por tiu aĝgrupo en la germana, angla, franca kaj itala lingvoj.

Ankaŭ la sekretario de ILEI, Marija BELOŠEVIĆ partoprenis la seminarion, kaj en neoficiala programo prezentis al interesuloj kelkajn E-projektojn kaj lernolibrojn (Infanoj ĉirkaŭ la mondo, Esperanto por ni 1-4, Tendaraj tagoj ktp.)

Konklude oni devas mencii, ke kompare kun aliaj lingvoj, lerni Esperanton en tiu aĝo ne estas multekoste. Kun lernolibroj kaj aliaj helpiloj, esperantistoj estas sur bona vojo proksimiĝi al similaj projektoj.

M.B.

Internacia Komisiono pri Edukado por la 21-a Jarcento

Tiu Komisiono – starigita laŭ la decido de la 26-a Ĝenerala Konferenco de Unesko – ekkunsidis en marto 1993 kaj raportos komence de 1995. Ĝi celas "pristudi la talentojn, sciojn, lertojn kaj konojn, kiujn la individuo bezonas por plene kaj konstrue partopreni en la evoluo de sia socio". Ĝia raporto "devus konsistigi bazon por vasta renovigo de la edukado, kaj vortigi gvidajn principojn por la Eduka Fako de Unesko".

La invito de Unesko, ILEI proponis al la Komisiono liston de taŭgaj fakuloj-esperantistoj, kiuj povus kontribui al ĝia laboro.

Sekvante sugeston de la vicprezidanto, profesoro Ron Glossop, gvidanto de la eksteraj rilatoj de ILEI, ni publikigas ĉi tie la plenan konsiston de la Komisiono. Se iu deziras kontakti unu el la komisianoj, li/ŝi bonvolu unue konsultiĝi kun profesoro Glossop pri la sekvinda strategio.

Prezidanto:

s-ro Jacques Delors (Prezidanto de la Eŭropa Komisiono)

Membroj

s-ro Isao Amagi, japana edukisto;
s-ro Roberto Carneiro, portugala eksministro pri edukado, nun prezidanto de sendependa televid-kompanio;
s-ino Fay Chung, zimbabva ministro kaj eksministro pri edukado;
s-ro Carlos Fuentes, meksika verkisto kaj universitata profesoro;
s-ro Bronislaw Geremek, pola historiisto kaj parlamentano;
s-ro William Gorham, usona politologo;
s-ino Aleksandra Kornhauser, slovena direktoro de kemia instituto;
s-ro Abdallah Laroui, maroka historiisto;
s-ro Michael Manley, eksĉefministro de Jamajko;
s-ino Inaam Al-Mufti, jordania eksministro, specialisto pri la statuso de virinoj;
s-ino Marisela Padrón Quero, venezuela sociologo kaj eksministro;
s-ino Marie-Angélique Savané, senegalia sociologo;
s-ro Karan Singh, bharata aŭtoro, diplomato kaj eksministro;
s-ro Zhou Nanzhao, ĉina edukisto, vicdirektoro de la Ĉina Nacia Instituto por Edukaj Studoj.

Konsilantoj

s-ro Emeka Anyaoku, niĝeria diplomato, Ĝenerala Sekretario de la Commonwealth (ekskoloniaro de Britio);
s-ro Jorge Allende, ĉilia biokemiisto;
s-ino Margarita Marino de Botero, kolombia profesoro;
s-ino Gro Harlem Brundtland, ĉefministro de Norvegio;
s-ino Elizabeth Dowdeswell, direktoro de la Medi-Programo de UN en Nairobi;
s-ro Daniel Goeudevert, franca prezidanto de la administra konsilio de Volkswagen;
s-ro Makaminan Makagiansar, eksa ĝenerala direktoro de la eduka fako de Unesko;
s-ro Yehudi Menuhin, brita violonisto;
s-ro Thomas Odhiambo, kenja prezidanto de la Afrika Akademio de la Sciencoj;
s-ro René Rémond, franca historiisto;
s-ro Bertrand Schwartz, franca inĝeniero kaj membro de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Francio;
s-ro Anatoly Sobĉak, urbestro de Sankt-Peterburgo;
s-ro Myong Won Suhr, korea eksministro pri edukado;
s-ro David Suzuki, kanada sciencisto kaj scienc-popularigisto;
s-ro Ahmed Zaki Yamani, saŭd-arabia eksministro.

Speciala konsilanto al la Prezidanto:

s-ino Danièle Blondel, franca ekonomikisto.

De niaj legantoj

Pri la neceso de kunagado

Se en iu komunumo la aferoj iras ne bone, plendi pro tio estas tute normale. Kaj kaŭzon por plendi ni, bedaŭrinde, havas sufiĉe: la funkciado de la asocioj ekzistas nur surpapere, niaj s-anoj forlasas la komunumon, kaj ankaŭ ĉi lasta ŝajnas forlasi la trajtojn de komunumo. Kvankam aŭdi plendojn estas neagrable, se ilin sekvas ia ekprospero, aŭ almenaŭ brileto de perspektivo, oni ilin tamen toleras. Sed aŭdi nur kaj sole plendojn estas netolereble, kaj da esperigaj proponoj oni aŭdas tre malofte (kvankam da ili verŝajne ekzistas ankaŭ pli, sed ili abortas antaŭ sia apero — ĝenerale pro kulpa arbitremo aŭ miopeco de certaj novbakitaj "presreĝetoj"; ve al vi, movado, se viajn funkciojn transprenas izolitaj individuoj!) Ĉio ĉi sugestas senesperigon. Mi provas pruvi, ke niaj ŝancoj estas tamen ne tiom senesperigaj.

La antaŭkondiĉoj

Sen la pretendo de ĝisfunda analizo diri ni povus tion, ke krude ili estas grupigeblaj en du grupojn: en tiujn subjektivan kaj objektivan. Al la unua apartenas du faktoroj: 1-e la konvinkiĝo pri tio, ke plenumi la funkcion de IL Esperanto taŭgas, 2-e la akcepto de tio, ke por Esperanto efike fari ion ajn scipovas sole ni, ke agi por ĝi krom ni emis, -as kaj -os neniu. La objektivan antaŭkondiĉon konsistigas la funkcio de sana asocio, sana faka asocio, kaj ilia kunago. Inter ili la subjektiva faktoro ludas la pli gravan rolon, ĉar sukcese labori sen ĝia ekzisto simple ne eblas, kaj ĝia ekzisto povas certigi la ekziston de la dua kondiĉo, se ĝi ne ekzistus.

Analizi la subjektivan kondiĉon ĉi-kadre estas neeble (en ĉi tio aliaj estas certe pli kompetentaj ol mi), skribi mi volas sole pri la kunago de Esperantistajinstruistoj.

Ĉar samfakuloj, la kriteriojn de bone funkcianta kolektivo ni konas bone. Inter ili la organiziteco, la ebleco kontaktiĝi persone, la distribuo de taskoj ekzistas, sed la ekziston de taŭgaj celoj, strategio mi forte kontestas, kvankam la "animon" de unu kolektivo konsistigas ĝuste ili. Tio, ke la tradiciaj asocioj (ekz. la Hungaria) funkcias malbone, estas konata. Iliaj sensukcesoj originas verŝajne el ilia neadekvata rilato al Esperanto, ĉar alikaze rimedojn por plibonigo de siaj agoj ili verŝajne trovus.

Diri, ke niakaze la problemoj sin kaŝas kie, mi estas ne tre kompetenta, sed ĉar parte kelkajn spertaĵojn pri la esperantistaj instancoj mi havas, kaj parte ĉar la kunagon por Esperanto mi ege bezonas, se mi mencias kelkajn fenomenojn koncerne ilin, estos eble ne superflue.

Nian laboron karakterizas la manko de strukturiteco: ni agas nur "ĝenerale", sen la indiko de celoj proksimaj kaj malpli proksimaj. Ambaŭkampe troveblus "atakpunktoj", kiujn sieĝinte atingi ni scipovus ne malpli, ol la sekurigon de estonto de Esperanto.

Niakaze tiu atakpunkto estus la enkonduko de Esperanto en bazlernejojn tra ĝia uzo kiel ponto-(unua)lingvo fremda. La avantaĝojn de apliko de Esperanto kiel unua fremda lingvo en la instrusistemo oni jam konstatis, sed ilian eluzon oni ankoraŭ praktike komencis apenaŭ. Kvankam, per ilia apliko Esperanton ni instruus al tiu tavolo de la popoloj, al kiu ĝi estis ankoraŭ origine destinita — al tiu plej vasta. Memkompreneble, lerno de Esperanto nur dum 2–3 jaroj ĝian finlernon ankoraŭ ne signifas, sed en bazlernejoj ekzistas ankaŭ ceteraj kadroj por plulernigi ĝin (fakrondoj, fakultativa instruo ktp.). Sed kunago estas bezonata ankaŭ ĉi-kampe.

Sub kunago mi komprenas kaj tiun de E-instruistoj, kaj inter ili kaj la anoj de la tradiciaj asocioj. Ĝi estas ne malhavebla. Nur instrui Esperanton kaj ne zorgi pri ĝia uzebleco signifas aĉeti lokomotivon sen ekzisto de fervojoj. Sed zorgi kaj pri lokomotivo, kaj pri fervojoj por ILEI estus tro multe, necesas do kunlaboro inter ĝi kaj la tradicia movado. La bazprincipojn de la sukcesa laboro por Esperanto ni ne forgesu: kunlaboro internacia, samtempa kaj helpata de la anoj de tradiciaj asocioj. Se el inter ili mankas eĉ nur unu, ni fiaskos (kiel tio okazis ankaŭ ĝis nun ĉiam). La kunlaboro estas grava kaj por nia propagando kaj por tio, ke la konscio de nia multopeco nin helpu en subteno de persisto, agemo.

Ĉu la anglan aŭ Esperanton?

Estas ankoraŭ unu demando, kiun malatenti, precipe pro la okazintaĵoj en Orient-Eŭropo estas nekonsilinde.

En tiu ĉi ekssocialisma parto de la maljuna kontinento precipe dum la lastaj kvin jaroj la poziciojn de la rusa lingvo (precipe kiel lingvo devige instruita) transprenis la okcidentaj lingvoj, unuavice la angla. Sekve de tio ĉi multaj samideanoj turnis dorson al Esperanto. La aferon oni bedaŭras, sed tiujn "samideanojn", kiuj efike de ĉi tiel malforta kontraŭvento siajn selojn jam transmetas sur alian ĉevalon, mi ne funebras. Tamen, klarigi la staton kaj realajn eblojn de Esperanto nepre necesas.

Kiun lingvon do por la IL? Por vera Esperantisto la demando efektive eĉ ne ekzistas: kiel IL ni elektas Esperanton. Do: ĉu tio ĉi signifas, ke instruantoj de Esperanto instrui la anglan jam ne rajtas? Ne, absolute ne. Unue, ĉar pretendi ĉi tion estus neeble, ĉar inter ni troveblas ankaŭ instruantoj de la angla, ili vivtenas sin kiel tiaj. Due, ĉar fari tion ĉi estus vana ago, ĉar oni ĝin bezonas. Samtempe juĝi niajn samideanojn instruantajn la anglan (aŭ aliajn etnajn lingvojn) kaj Esperanton ne, ni devas jam alimaniere. Ilin nomi (se akcepteblan ekskuzon produkti ili ne scipovas) ni povas rajte perfiduloj, precipe se la Esperanto-scipovon de nia "samideano" oni ekscias, ĉar ĉi-maniere ili atestas pri tio, ke ili Esperanton opinias netaŭga eĉ por plenumi la rolon de la unua fremda(pont-)lingvo.

Ni estu ne tro "malmodestaj" postulante, ke oni instruu sole Esperanton (atingi tion ĉi ni eĉ ne scipovus) en lernejoj. Se atingi ni klopodos "nur" tion, ke nian lingvon oni uzu kiel la devige instruendan unuan (pontan) lingvon, eĉ se komence nur por 2–3 jaroj, ni atingos jam ne malmulte! Tio ĉi estos eĉ multe: ni tiam Esperanton jam surmarketigis, ĝin prezentis por gustumigi al la popoloj, la ceteraj taskoj apartenas jam ne al ni!

Se kelkaj samideanoj estus malriĉaj je motivoj por sin okupi pri Esperanto, jen unu nova, ne tre ofte laŭtigita. Eŭropo estas ne sole la naskiĝkontinento de Esperanto, sed ankaŭ tiu parto de la mondo, kie ĝia uzo estus la plej racia kaj necesa. Ĝia neceso nun, tempe de unuiĝo de la kontinento iĝas pli kaj pli granda. Per ĝia uzo kiel helplingvo la maljuna kontinento travivus ion tie neniam spertitan: la iĝon de multaj nacioj en unu popolon. Sen komuna lingvo neŭtrala al ĉiuj nacioj tio ne eblas. Kaj se tiu ĉi belega ideo realiĝos, ni ekspertos ankaŭ la benojn de Esperanto, la realigon de la interna ideo tiom sopiritan far nia majstro.

PETIK János
Balassagyarmat
Szontágh P. u. 9/7.
H-2660

*****

INSTRUISTA RETO

por uzantoj de mallongondaj elsendoj kun la celo studi mediojn, tutmondan perspektivon, mondan geografion, sociajn studojn kaj aliajn studtemojn estas starigata far s-ro Neil Carleton, P.O.Box 1644, Almonte, Ontario KOA 1AO, Kanado. Lia letero aperis en *BBC Worldwide*, januaro 1994. Espereble multaj en la reto interesiĝos pri internacilingva interkomunikado.
Informis: Arnold Victor, Apartement 1, 160 West 11th Street New York, 10011 USA

*****

ALBANAJ ESPERANTISTOJ EN KROATIO

Fine de majo okazis en Zagreb ekzamensesio de UEA/ILEI, kiun partoprenis ankaŭ 12 mezlernejanoj el Albanio. Pri ilia restado okupiĝis la Junulara Sekcio de KEU kaj la ILEI-sekcio, kunlabore kun la Unuiĝo de albanoj en Kroatio. Bonega kono de E-gramatiko montrita dum la elementa ekzameno estas granda merito de instruista teamo en Albanio.

mb

Instrua praktiko

Ekzerco por evoluigi la aŭskulto- aŭ la lego-kapablon

La instruisto laŭtlegu (resp. la lernantoj mem legu atente) la sekvan mallongan tekston kaj poste la lernantoj faru la teston. Povas okazi, ke la grupanoj ne trovos **la** ĝustan solvon je kelkaj asertoj, ja povas esti, ke laŭ la diversaj vidpunktoj estos **pluraj** solvoj. Konsciigu al viaj gelernantoj, ke ankaŭ tiu diskuto estas parto de la ekzerco!

TRI TAJLOROJ

En iu urbo kaj en iu strato vivis tri tajloroj. Unu el ili elmetis en la fenestro de sia laborejo la reklamon: „La plej bona tajloro de la urbo".

La dua tajloro vidis, ke nun pli multaj homoj vizitas la unuan tajloron. Li elmetis en la fenestro de sia laborejo la reklamon: „La plej bona tajloro en la mondo".

Kio restis al la tria tajloro?

Li elmetis sur la fenestro de sia laborejo la modestan informon: „La plej bona tajloro de la strato."

Elektu la konstatojn, kiuj estas konformaj al la teksto!

1. En iu urbo vivis tri tajloroj.
2. La tajloroj ne konis unu la alian.
3. Nur unu el la tajloroj havis multe da klientoj.
4. Unu el la tajloroj elmetis ŝildon kun la frapfrazo: „La plej bona tajloro de la mondo".
5. La dua tajloro elmetis nenion en sia fenestro.
6. La dua tajloro volis superi la unuan.
7. La dua tajloro estis pli modesta ol la unua.
8. La tria tajloro longe, tre longe meditis kiel superi la ceterajn.
9. Fine li decidis depreni la ŝildojn de la ceteraj tajloroj.
10. La tria elmetis tre simplan kaj tre modestan reklamfrazon: „La plej bona tajloro de la strato".
11. La plej modesta povis superi ĉiujn siajn konkurantojn.
12. Ofte okazas ke malpli estas pli ol la plej de fanfaronuloj/gaskonoj.
13. Ĉiuj klientoj forlasis la fanfaronemajn du unuajn tajlorojn.
14. La preterpasantoj povis nur ridi pri la konkurado de la tajloroj.
15. Ĉiuj tri tajloroj nomis sin la plej bonaj.

Laŭ la aperigota ekzercaro de KURUCZ Géza

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

esperanto
internacia lingvo

Financa raporto 1993.

RIMEDOJ	SEK
Membrokotizoj	38.096:19
Libroj	4.700:43
Fondaĵo Szerdahelyi*	30.220:-
Ekzamenoj	2.138:96
Eldonoj	4.254:73
Kompenso UEA	8.597:-
Donacoj	1.932:35
Koleghelpa konto*	692:-
Diversaĵoj	387:20
Interezoj	6.310:67
	97.329:53
Malgajno	11.348:94
	108.678:47

KOSTOJ	SEK
IPR	44.356:97
Bankkostoj	787:-
Fondaĵo Szerdahelyi*	25.818:91
Presaĵo, fotokopioj ktp	3.297:28
Faka kotizo, UEA	1.186:39
Estraro, vojaĝoj ktp	4.163:70
Azia agado	1.647:42
Koleghelpa konto*	1.200:-
Afranko	3.923:45
Konferenco + gimnazio	5.857:45
JA	2.734:30
Laserprintilo, farbo	684:80
Ŝuldo repagita	620:80
Lukostoj, Budapeŝto	3.600:-
Honorario	8.800:-
	108.678:47

* Ciuj sumoj estas netaj escepte Fond. Sz. kaj Koleghelpa konto. Bonvolu vidi la detalan raporton.

AKTIVO	
En kaso	0
Banko: SE	75.760:44
Färs & Frosta	1.629:03
Poŝtĝiro	4.954:14
UEA, ilek-a	43.333:44
Ce sekcioj	500:-
Librostoko	7.000:-
Prunto redonata	3.000:-
Oficejaj aĵoj	4.000:-
Nepagitaj fakturoj	4.000:-
JA, ŝuldo	2.734.30
Filatelaĵoj	1:-
	146.912:35

PASIVO	
Koleghelpa konto	231:40
Fondaĵo Szerdahelyi	4.854:27
Rezervo: presado	8.332:80
distribuo	774:57
Ŝuldoj: GCA	8.145:98
IPR	1.603:50
prunto	7.100:-
diversaj	3.515:30
	34.557:82
Propra kapitalo	112.354:53
	146.912:35

1993-12-31

Bertil Andreasson
kasisto ILEI

DETALOJ

IPR

Rubriko	4/92	1/93	2/93	3/93	Entute
Presado	5.403:74	5.026:98	5.170:58	5.026:98	20.628:28
Ekspedoj	773:26	811:30	811:30	811:30	3.207:16
Afranko	3.643:79	3.324:10	3.084:82	3.299:97	13.352:68
Kompostado	1.188:-	1.080:-	1.080:-	1.080:-	4.428:-
Fotoj	77:95	38:98			116:93
Aldono	376:07	1.637:92	92:80		2.106:79
Imposto	127:82	152:66	120:64	116:-	517:13
	11.590:64	12.071:94	10.360:14	10.334:25	44.356:97

Koleghelpa konto

Saldo 1992-12-31			739:40
Donacoj 1993		692:-	
24 membrokotizoj		-1.200:-	- 508:-
Saldo 1993-12-31			231:40

Fondaĵo Szerdahelyi

Saldo 1992-12-31			17.263:18
Donaco			12.895:50
Instrurajtigaj kursoj:	KCE	- 21.611:26	
	Poprad	- 146:40	- 21.757:66
Stipendioj ELTE			- 4.061:25
Interezo			514:50
Saldo 1993-12-31			4.854:27

Eldonoj

Rubriko	Enspezoj	Elspezoj	Rezulto
Tendaraj Tagoj I	5.401:14	9.124:35	- 3.723:21
Tendaraj Tagoj II	6.795:22	541:45	6.253:77
IE-broŝuro	120:-		120:-
Symoens: La valoro angla	60:-		60:-
Teorio kaj praktiko..	1.620:27		1.620:27
Kunvojaĝu		76:10	- 76:10
	13.996:63	9.741:90	4.254:73

Evoluo de la eldonado

Rubriko	1993-12-31	1993	Stato	Notoj
Tendaraj Tagoj I	4.805:53	- 3.723:21	1.082:32	represo
Tendaraj Tagoj II	- 3.007:79	6.253:77	3.249:98	
IE-broŝuro	4.501:40	120:-	4.621:40	
Symoens: angla	- 3.068:03	60:-	- 3.008:03	
franca	- 3.677:86		- 3.677:86	
Teorio kaj praktiko..		1.620:27	1.620:27	presado pagota 94
Kunvojaĝu		- 76:10	- 76:10	en preparo
			3.811:98	

Rezervo por Teorio kaj Praktiko..:	presado	8.332:80
	distribuo	774:57
		9.107:37

RIMEDOJ (SEK)		KOSTOJ (SEK)	
Abonoj	19.280:73	Presado	9.133:60
Donacoj	4.304:89	Afranko	8.189:60
Vendo	249:61	Dogankotizoj	69:60
Interezo	221:14	Premioj	22:-
		Honorario	1.056:-
			18.470:55
		Gajno	5.585:82
	24.056:37		24.056:55

AKTIVO		PASIVO	
En banko	437:08	Suldo al ILEI	2.734:30
UEA-konto: juna-l	21.285:91	Lukostoj, ŝuldo	2.000:-
		Propra kapitalo	16.988:69
	21.722:99		21.722:99

La redakcio pri la kontoj:

Jen la financa raporto por 1993. Ĝi montras, ke duan jaron ILEI deficitas je proks. 10%. Nia kasisto multe laboris por malgrandigi tiun deficiton; se serĉi ĝojon el tiu rezulto, necesas pensi, ke ĝi tamen spegulas multan agadon, kaj agado kostas!

Juna amiko: La supre indikita gajno estas nur surpapera; aliloke vi trovos ŝuldojn de 4.734:30 SEK notitaj por honorarioj kaj lu-kostoj. Eĉ tio ne kovras tute la realajn kostojn de honorarioj kaj luado ligitaj al la revuo. Fakte ILEI subvencias la gazeton modere el sia ĝenerala buĝeto. Se ni enkalkulus plene ĉiujn kostojn, JA deficitus je proks. 10% (same kiel ILEI entute.)

Fondaĵo Szerdahelyi: Ronde, ĝi malpleniĝis de 30.000 ĝis 4.000 SEK, spite bonan donacan enfluon dum la jaro. Preskaŭ la tuta elpago rilatis al la instruista kurso en KCE, kiu foruzis la sumon akumulitan tra kvin jaroj. Estus baza tasko de la Ligo funkciigi kaj financi tiajn kursojn ĉiujare, sed evidentas, ke nia financa stato permesos tion ne pli ol unufoje en kvin jaroj. Kvankam KCE ĉi-jare lastatempe duonigis ĉiujn siajn tarifojn, ILEI ne havas rimedojn duan jaron subteni la kurson. Estas tempo, ke la pli larĝa movado rekonu la neceson regule investi en instruista trejnado kiel antaŭpaŝo de serioza instruado de la lingvo!

Kapitalo: Tio restas stabila, dank' al la insisto de nia kasisto, sed ni devas rimarki, ke ĝia kresko ĉi-jare estas tre modesta kompare kun la antaŭaj jaroj.

Konklude: La Ligo urĝe devas iomgrade profesiigi sian laboron por taŭge prizorgi la edukan kampon, sed ni vidas, ke eĉ plej modestaj klopodoj tiurilate trafas financan baron, kaj la komencitaj paŝoj estas retiritaj. Necesas serioze strebi al plue stabila sed signife pli granda kapitala bazo por permesi ordan plenumon de la taskoj kaj alprenon de novaj projektoj.

Komentis: Stefan MacGill

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien
Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
Ĉehio: Miroslav Malovec, Charkovska 7/10, CZ-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Juhkentali 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Kymenlaaksonkeskussairaala as. A 12, SF-48210 Kotka
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin du Thural, FR-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, ES-41080 Sevilla
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa
Japanio: *vakas kaj forstrekota.*
Korea Resp.: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-41000 Zagreb
Kubo: H. Jiménez, Vista Alegre 264 e/J.B. Zayas y Luz, Caballero, Vibroa, 11500 C.Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, 1704 BH Heerhugowaard
Nordameriko: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Toröd.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw 17
Portugalio: D-ro Antonio M.C. Coimbra, Rua Colonel M. Leitao 20.1 Esq., P-1700 Lisbon
Rumanio: Angela Stoica, Platanilor 17 C ap. 4, RO-1900 Timisoara
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, 058 01 Poprad
Slovenio: Sonja Tavcar, Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby
Svislando: Nicole Margot, *adreso sciigota.*
Venezuelo: Prof. Juan Eduardo Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaire)

REPREZENTANTOJ DE ILEI

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P. O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P. O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-Biakou Yao, B.P. 20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UKR-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, Taŝkent

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle.
Ekzamenoj: Elementa kaj meza niveloj : Sekretario : d-ro Ivan Bekavac-Basic.
Supera nivelo: Sekretario serĉata.
Prezidantaro: d-ro Till Dahlenburg plus du nomotoj de UEA.
Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide); tel. (+32 3) 666 62 66.
Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien; tel. (+43 222) 36 86 29.
Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyiri u. 11, HU-6000 Kécskemet.
Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore Budapeŝto plenumas. *Ni traktas kun nova plenumanto en Usono.*
Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl; tel. (+31 2209) 15 65.
Terminologio: *vakas*
UN-Jaro de la Familio 94: prof. Glossop.

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, F-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.
KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por OKR-enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. Bv. skribi vian nomon kaj adreson sur la manuskripto. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGOJ POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksis kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:
Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:
UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĉk 37 89 64. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: **ilek-a**. Se rilatas al *Juna amiko*, uzu konton **juna-l**. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri via enpago. Membreco 1994: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.
Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj (300 HUF) de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo. Konto: OTP Budapest XXII ker, fiók 546-006891-8.